



**PLATONO**

**APOLOGIO  
DE  
SOKRATO**


**KRITONO**

1b x 2002 h e f 005262 jc

PLATONO

APOLOGIO DE SOKRATO  
KAJ KRITONO


elhelenigis  
D-ro Albert Goodheir



Glasgow  
ELDONEJO KARDO  
1981



FEDERACION  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO




© Kopirajto de Traduko: 1981 Albert Goodheir

ISBN: 0 905149 15 7

**Kompostita de Fonto (Brazilo)**


**Eldonejo KARDO**  
**16 Woodlands Drive**  
**Coatbridge ML5 1LE**  
**Skotlando**

**Tel. 0236.21636**  
**Giro 17 300 4008**



**APOLOGIO DE SOKRATO**

**KAJ KRITONO**



## ANTAŬPAROLO

Sokrato (470–399 a.K.) restas enigma figuro: filozofo influhava, kiu postlasis neniun verkon; homo raciema kaj samtempe religia kondamnita kiel subfosinta de la tradicia religio. Nia scio pri li dependas ĉefe de lia disĉiplo, la granda filozofo Platono (427–347) kaj de Ksenofonto (ĉ. 430–ĉ. 355), verkisto pri militaj kaj ekonomiaj aferoj, admiranto de Sokrato sed tute ne filozofiema. Al ili oni devas aldoni la komediverkiston Aristofano, kiu en la komedio *La Nuboj* ridindigis Sokraton, tiam 47-jaran, kiel modernistan fantaziulon ŝvebantan inter tero kaj ĉielo. Krome oni trovas en verko de Aristotelo (384–322), alia granda filozofo kaj disĉiplo de Platono, la gravan sciigon, ke ne Sokrato sed Platono proponis la teorion pri “eternaj ideoj”.

Sokrato estis civitano de Ateno, la tiama centro de greka kulturo. Ateno sukcese defendis la sendependecon de la grekaj urboj kaj venkis la armeojn de la persa reĝo en 490 kaj 480 a.K. Sekvis florado de atena kulturo, al kiu ni dankas la Partenonon kaj la dramojn de Eŝilo, Sofoklo kaj Eŭripido. Poste Ateno perdis sian potencon rezulte de malsukcesa tridekjara milito kontraŭ Sparto, la plej konservativa el la grekaj ŝtatoj. Ateno estis demokrata: la ŝtaton regis popola asembleo, en kiu ĉiu civitano havis egalajn rajtojn, kaj oni elektis la magistratojn

per loto. La multaj sklavoj, fremdaj enmigrintoj kaj virinoj tamen havis neniajn rajtojn. La asembleo, sub influo de demagogoj, kelkfoje agis kruele kaj kontraŭleĝe, kaj Sokrato malaprobis la elekton per loto. Post la malvenko mallonge regis aristokrata partio, la “tridek tiranoj”, kiujn subtenis Sparto, sed post jaro la demokratio estis restarigita per sensanga revolucio, kiun sekvis amnestio. Sokrato, kiu kritikis la demokration, ankaŭ rifuzis obei ordonon de la “tiranoj” kaj tiel riskis sian vivon.

La “modernismo”, kiun mokis Aristofano, estis la instruado de la “solistoj”, kiuj proklamis, ke moralo estas relativa kaj dependas de loko, tradicio kaj interesoj. Samtempe aliaj pensuloj enkondukis novajn teoriojn pri la universo, kiujn konservativaj civitanoj rigardis kiel subfosadon de la religio. Sokrato, kiun publika opinio envicigis kun la sofistoj, fakte estis ilia kontraŭulo. Li ne proklamis teoriojn pri la universo, ĉar ili laŭ li ne helpis la homojn vivi pli bone. Cicerono, kvar jarcentojn poste, prave diris, ke Sokrato kondukis la filozofion el la ĉielo sur la teron inter la homoj. Li rigardis la instruadon de la sofistoj kiel erarigan. Ili pretendis instrui virtojn, sed laŭ Sokrato oni ne povas paroli inteligente pri saĝo, kuraĝo aŭ aliaj virtoj, se oni ne unue konsentas pri la signifo de tiuj vortoj. Do lia unua kontribuo al la filozofio estis ke li serĉis difinojn, kaj lia dua, ke li serĉis ilin per la metodo de dialektiko: oni alproksimiĝas al la vero per diskutado, demandante en kiu senco oni uzas la vortojn.


Sokrato ne rigardis sin kiel instruiston kaj ne pretendis scii la veron; li estis, laŭ siaj propraj vortoj, akuŝisto, helpante aliajn naski la scion pri la vero. Li mem rakontas en la Apologio, kiel lia metodo, kiu celas konsciigi la kunparolanton pri lia nescio, malpopularigis lin. Krome, kelkaj el la juna generacio, kiuj ĉerpis senskrupulecon el la instruado de la sofistoj, iam apartenis al lia cirklo, inter ili la fifama sed brila Alkibiado, kaj la publiko kulpigis la influon de Sokrato.

Platono, kiu konis Sokraton nur maljunan, estis la plej fama inter liaj disĉiploj. Li honoris sian majstron, kaj malŝatis la demokratan

reĝimon, kiu mortkondamnis lin kiel misgvidinton de la juna generacio kaj proklaminton de novaj dioj. En siaj dialogoj Platono enkondukis Sokraton kiel diskutanton kaj metis en lian buŝon siajn proprajn ideojn. Estas neverŝajne, ke la historia Sokrato, kiu respektis metiistojn (laŭdire lia patro estis skulptisto), estis tiel kontraŭdemokrata kiel li aperas en la *Respubliko* de Platono. Oni memoru, tamen, ke la politikaj ideoj de tiu verko estas alegorio pri la homa animo, sed apenaŭ projekto, kiun Platono opiniis realigebla. Parenteze, Platono estis la unua kiu diris, ke virinoj havas egalajn kapablecojn kaj devas havi egalajn rajtojn kiel viroj, dum la atena demokratio neis al virinoj politikajn rajtojn.

En la platona dialogo *Fedono* Sokrato antaŭ sia morto diskutas senmortecon kaj pravas ĝin per la teorio de eternaj ideoj. Estas verŝajne, ke tie parolas Platono pli ol Sokrato. En la Apologio, tamen, oni sendube renkontas la veran Sokraton. Multaj Atenanoj aŭdis lian paroladon antaŭ la juĝistoj, kaj Platono sendube donas ĝian esencon, eĉ se li ne ripetis la ekzaktajn vortojn. Ankaŭ la dialogo *Kritono* havas evidenton de aŭtentikeco.

Sokrato, pioniro de etika filozofio, homo kiu elektis morti prefere ol fari ion kontraŭ sia konvinko, denove alparolas nian generacion. Li montras vojon al la vero pli noblan ol tiun de dogmatismo, religia aŭ politika, kaj tiun de relativismo. Kiam ajn la homan kulturon minacas amashisterio kaj cerblavado, sonas proteste la vortoj de Sokrato kaj lumas inspire la ekzemplo de lia vivo kaj morto.



## LA APOLOGIO DE SOKRATO

Mi ne scias, Atenanoj, kian impreson donis al vi miaj akuzantoj. Ili parolis tiel persvade, ke mi certigas vin, ke mi apenaŭ rekonis min mem. Tamen, mi rajtas diri ke ili ne parolis eĉ unu veran vorton. Inter iliaj multaj mensogoj mi trovis la plej miriga, ke mi estas elokventa, kaj ke vi devas esti singardaj por ke mi ne trompu vin. Ili ne hontas diri tion, kvankam mi tuj refutoŝ ilin kaj montros, ke mi tute ne estas elokventa. Tio ŝajnas al mi la plej senhonta inter ĉio kion ili diris, almenaŭ se ne ili nomas elokventa tiun, kiu simple diras la veron. Se ili volas diri tion, mi konsentas ke mi estas oratoro, sed ne iliaspeca. Tiuj homoj parolis eĉ ne unu veran vorton, kiel mi jam diris, sed el mia buŝo vi aŭdos la veron. Tamen, je Zeŭso, Atenanoj, mi ne parolos oratore kiel ili, per bele ornamitaj frazoj kaj vortoj. Vi aŭdos nur la vortojn, kiujn mi ŝance trovis. Ne atendu ion alian, ĉar mi kredas, ke tio kion mi diros estas justa. Ne decus al mia aĝo, sinjoroj, aperi antaŭ vi kvazaŭ knabo kun zorge preparita parolado. Sed unu aferon mi petegas de vi. Kiam vi aŭdos, ke mi defendas min per tiaj vortoj, kiajn mi uzis ankaŭ sur la vendoplaco, apud la tabloj de la monŝanĝistoj, kie multaj el vi jam aŭdis min, kaj ankaŭ en aliaj lokoj, ne miru pro tio kaj ne faru bruon. La fakto estas ke nun, sepdekjara, mi aperas unua-

foje antaŭ juĝista tribunalo kaj do mi estas nesperta pri la parolmaniero, kiu konvenas tie. Sendube vi pardonus min, se mi estus fremdulo, kaj parolus laŭ la dialekto kaj parolmaniero en kiuj mi estis edukita. Tial mi petas, ĉar tio ŝajnas al mi justa, ke vi malatentu mian parolmanieron, kiu eble povus esti pli bona aŭ pli malbona, kaj atentu kaj konsideru nur ĉu mi parolas juste aŭ ne. Tio ja estas la virto de juĝisto, kaj paroli la veron estas la virto de la oratoro.

Unue, Atenanoj, estas juste ke mi respondu al la unuaj akuzantoj kaj al la unuaj falsaj akuzoj kontraŭ mi, kaj poste al la lastaj akuzantoj kaj la lastaj akuzoj. Ĉar multaj jam akuzis min antaŭ vi dum multaj jaroj kaj mensogis pri mi. Ilin mi timas pli ol Aniton kaj liajn kunulojn, kvankam ankaŭ ili estas danĝeraj. Sed la aliaj, sinjoroj, estas pli danĝeraj. Ili influis vin jam kiam vi estis infanoj; ili kredigis al vi la mensogon ke ekzistas iu Sokrato, intelektulo, kiu elserĉas ĉion en la ĉielo kaj sub la tero, kaj faras la malpli bonan argumenton pli forta ol la bona. Tiuj kiuj disvastigas tiun famon, Atenanoj, estas miaj plej danĝeraj akuzantoj, ĉar aŭdinte tion la homoj supozas, ke iu, kiu elserĉas tiajn aferojn, nepre estas ateisto. Tiuj akuzantoj, krome, estas multnombraj, kaj ili influis vin jam de la aĝo, infana aŭ adoleska, kiam vi estis facile persvadeblaj. Do ili estas kvazaŭ akuzantoj antaŭ tribunalo kie mankas defendanto. La plej maljusta estas, ke oni ne povas eltrovi kiuj ili estas, aŭ alvoki ilin per nomoj, almenaŭ se ne ŝance iu el ili estas komediverkisto. Estas tre malfacile kontraŭi tiujn, kiuj trompis vin pro envio aŭ malico, aŭ kiuj persvadis vin, ĉar ili mem estas persvaditaj; ne eblas ja voki ilin antaŭ tribunalo aŭ ekzameni ilin. Do mi devas defendi min kvazaŭ kontraŭ ombroj, kaj ekzameni dum mankas respondanto. Vi do komprenu, kiel mi jam diris, ke mi havas du specojn da akuzantoj: tiuj kiuj ĵus akuzis min, kaj la malnovaj pri kiuj mi parolis. Konsideru, do, ke mi devas unue respondi al la malnovaj, ĉar iliajn akuzojn vi unue aŭdis, kaj aŭdis pli ofte ol la novajn. Nu, bone, Atenanoj, mi respondos al ili, kaj malgraŭ la mallonga tempo mi provos forigi la antaŭjuĝon, kiun vi jam tiel longe havis kontraŭ mi. Mi vere dezirus, se tio estus

bona por vi kaj por mi, ke mi sukcesu, kaj ke mia defendo estu akceptata, sed mi scias ke tio estos malfacila; pri tio mi ne havas iluzion. Sed okazu kio plaĉas al Dio. Mi devas obei la leĝon kaj defendi min.

Ni konsideru ekde la komenco, do, kiu estas la akuzo, kaj kiujn kalumniojn Meleto kredis, kiam li skribis la akuzon kontraŭ mi. Nu, kion diras miaj kalumniantoj por akuzi min? Mi diros ĝin, kvazaŭ ĝi estus vera akuzo antaŭ tribunalo: "Sokrato estas krimulo, ĉar li okupas sin per elserĉado de tio, kio estas sub la tero kaj en la ĉielo; li faras la malbonan argumenton pli forta ol la bona, kaj tiajn aferojn li instruas al aliaj homoj."

Jen la akuzo. Vi mem vidis tion en komedio de Aristofano, en kiu drivas iu Sokrato, kiu pretendas ke li marŝas en la aero, kaj kiu babilas multajn aliajn sensencaĵojn, pri kiuj mi komprenas nenion. Nu, mi ne diras ke mi malŝatas tian scion, se iu vere posedas ĝin. Homoj kiel Meleto neniam akuzu min pri tia krimo! Tamen, Atenanoj, pri tiaj aferoj mi neniam okupis min. Mi alvokas la plejmulton de vi por atesti, kaj mi petas ke vi diru kaj klarigu tion unu al la alia, ĉiu el vi kiu aŭdis min diskuti, kaj tion faris sendube multaj el vi. Do, diru unu al la alia, ĉu vi iam aŭdis min diri multon aŭ malmulton pri tiaj aferoj. Tiel vi komprenos, ke ankaŭ la aliaj rakontoj pri mi estas samspecaj.

Ne estas vere, ankaŭ, ke mi prenas sur min la edukadon de homoj kaj postulas monon pro tio, kiel vi eble aŭdis. Tio estas tute malvera. Ŝajnas bone al mi, tamen, se iu vere povas eduki homojn, kiel ekzemple Gorgias el Leontini, Prodiko el Kos kaj Hippias el Elis. Ĉiu el tiuj homoj, sinjoroj, povas iri en iun ajn urbon kaj persvadi la junulojn forlasi la kunulecon de siaj samurbanoj, kiun ili povas havi senpage, kaj aliĝi al ili, pagi ilin pro tio kaj eĉ esti dankemaj! Krome ekzistas alia saĝulo, viro el Paros, pri kies alveno mi aŭdis tiamaniere: mi renkontis homon, kiu elspezis pli da mono al sofistoj ol ĉiuj aliaj kune, nome Kallias, filo de Hipponiko. Sciante ke li havas du filojn, mi demandis lin: "Kallias, se viaj filoj estus ĉevalidoj aŭ bovidoj, ni serĉus kaj dungus dresiston por ili, eble ĉevaliston aŭ terkulturiston, kiu povus

perfektigi la kvalitojn de tiaj bestoj. Do, ĉar ili estas homoj, kiun instruiston vi intencas trovi por ili? Kiu estas fakulo pri la kvalitoj de homo kaj civitano? Mi ja supozas ke vi, kiel patro de filoj, pripensis tion. Ĉu ekzistas tia homo aŭ ne?" "Sendube li ekzistas", li respondis. "Do, kiu li estas," mi demandis, "el kie li venis kaj kiun salajron li postulas?" "Li estas Eveno, Sokrato", li diris. "Li venis el Paros kaj li postulas 300 guldenojn". Mi opiniis, ke Eveno estis bonŝanca homo, se li vere posedas tiun arton kaj instruas ĝin tiel malmultekoste. Se mi havus tiun scion, mi certe fierus kaj fanfaronus. Sed, Atenanoj, tiu scio vere mankas al mi.

Nun eble iu el vi elparolos kaj diros: "Tamen, Sokrato, kion vi kutime faras? El kio estiĝis tiuj kalumnioj? Estas neverŝajne, ke vi gajnis tian reputacion dum vi faris nenion nekutiman, kaj kondukis kiel aliaj homoj. Do diru tion al ni, por ke ni ne juĝu vin tro haste."

Tio ŝajnas al mi justa demando, do mi provos montri al mi, pro kio mi ricevis tian reputacion kaj tiajn kalumniojn. Do aŭskultu min, eĉ se kelkaj el vi opinios ke mi ne parolas serioze, ĉar mi rakontos al vi la veron. Mi gajnis tiun reputacion, Atenanoj, pro iaspeca saĝeco. Kiaspeca? vi demandos. Eble ĝi estas homa saĝeco; tiuokaze mi estus vere saĝa. Tiuj homoj, tamen, pri kiuj mi ĵus parolis, eble havas superhoman saĝecon. Mi ne scias kiel alie nomi ĝin, ĉar mi ne komprenas ĝin; se oni diras tion pri mi, oni mensogas kaj kalumnias. Nun, Atenanoj, ne interrompu min, eĉ se ŝajne mi fanfaronos. La vortoj, kiujn mi uzos, ne estas miaj; mi indikos al vi la parolinton kaj li estas fidinda. Ĉar por atesti pri mia saĝeco, kia ĝi estas, mi alvokos la dion de Delfoj. Sendube vi konas Ĥajrefonon; li estis mia amiko ekde infanaĝo, kaj ankaŭ de via popola partio; kun vi li estis ekzilita kaj revenis. Do vi scias, kia homo estis Ĥajrefono kaj kiel entuziasme li ĉiam agis. Iam li iris al Delfoj kaj kuraĝis demandi al la orakolo — ne interrompu, sinjoroj — li demandis, ĉu iu estas pli saĝa ol mi, kaj la aŭguristino respondis, ke neniuj estas pli saĝa. Tion lia frato povas atesti; li mem ja estas mortinta.

Nun rimarku, kial mi rakontas tion. Mi volas montri al vi, kiel naskiĝis la kalumniado kontraŭ mi. Kiam mi aŭdis la orakolon, mi pripensis: Kion diris la dio; kion tio signifas? Mi ja scias, ke mi ne havas ian saĝon, grandan aŭ malgrandan, tamen li nomas min la plej saĝa homo! Li ne mensogas: tio ne estas lia kutimo. Dum longa tempo mi ne sciis kion diri, kaj post multe da hezito mi provis pritrakti la aferon tiamaniere: mi iros al iu, kiu laŭdire estas saĝa. Mi atendis ke tiel, se iel, mi povus provi la orakolon kaj refuti ĝin: jen iu pli saĝa ol mi, tamen vi diris ke mi estas la plej saĝa! Sed kiam mi ekzamenis lin — ne gravas lia nomo, Atenanoj; la homo, pri kiu mi spertis tion, estis unu el niaj politikistoj — kaj kiam mi parolis kun li, mi devis konkludi, ke tiu homo ŝajnas saĝa al multaj aliaj kaj ĉefe al si mem, sed ne estas. Pro tio li, kaj multaj ĉeestantoj, malamamis min. Foririnte, mi diris al mi ke mi estas pli saĝa ol tiu homo. Eble ni ambaŭ ne scias ion valoran, sed li, kvankam nesciante, opinias ke li scias, dum mi ne scias kaj ne opinias ke mi scias. Ŝajne, do, mi estas pli saĝa ol li, almenaŭ pri tiu detalo ke mi ne opinias scii kion mi ne scias. Poste mi iris al iu, kiu laŭdire estas eĉ pli saĝa, kaj pri li mi havis la saman sperton, kaj la rezulto estis, ke ankaŭ li kaj multaj aliaj malamamis min.

Poste mi iris al unu post la alia, kaj spertis ke oni komencis malami min, pri kio mi estis malgaja kaj ĉagrenita. Tamen ŝajnis al mi necese, ke mi unue atentu la volon de la dio, kaj ekzameni ĉiujn, kiuj laŭ reputacio estis saĝaj. Je la Hundo, Atenanoj, mi devas diri al vi la veron. Jen kio okazis al mi. Kiam mi faris mian serĉon, laŭ la volo de la dio, mi trovis ke tiuj kun la plej alta reputacio estis preskaŭ ĉiam pli mankhavaj, kaj aliaj, laŭdire malpli saĝaj, vere havis pli da inteligento. Mi nun devas rakonti kiel mi vagadis, ĉar pravigi la orakolon estis vera laboro por mi. Post la politikistoj mi iris al la poetoj, la verkistoj de tragedioj, ditiramboj kaj aliaj poeziaĵoj, kaj mi atendis ke mi evidentigos malpli saĝa ol ili. Mi do prenis el iliaj poemoj tiujn, kiuj ŝajnis al mi la plej malsimplaj, kaj demandis pri ilia signifo, esperante ke samtempe mi povos lerni ion. Nu, sinjoroj, mi hontas diri al vi la veron, tamen

mi devas diri ĝin. Preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj, mi rajtas diri, havis ion pli bonan por diri ol tio, kion la poetoj mem diris pri siaj verkaĵoj. Do mi baldaŭ konkludis pri la poetoj, ke iliaj verkoj ne naskiĝas el ilia saĝo, sed el natura talento aŭ inspiro. Simile faras profetoj kaj aŭguristoj; ili proklamas multajn belajn aferojn, kiujn ili mem ne komprenas. Mi konkludis, ke la sama pravas por poetoj, tamen mi rimarkis ke ili konsideras sin la plej saĝaj inter la homoj koncerne aliajn aferojn, pri kiuj ili scias nenion. Do mi lasis ilin, opiniante ke mi superas ilin same kiel la politikistojn.

Finfine mi iris al la metiistoj, ĉar mi komprenis ke ĉi tie oni povus diri ke mi estas nenionscianta, kaj mi estis certa ke mi trovos ilin spertaj pri multaj valoraj aferoj. Pri tio mi ne eraris. Ili sciis kion mi ne sciis, do koncerne tion ili estis pli saĝaj ol mi. Sed, Atenanoj, mi trovis ke tiuj bonaj metiistoj eraris same kiel la poetoj, ĉar estante spertaj pri sia arto, ili konsideris sin ankaŭ la plej saĝaj pri aliaj kaj pli altaj aferoj. Tiu eraro eklipsis iliajn realajn sciojn. Do pro la orakolo mi demandis min, ĉu mi preferas esti kiel mi estas, nek saĝa laŭ ilia saĝo, nek nescianta laŭ ilia nescio, aŭ havi ambaŭ kiel ili, saĝon kaj nescion. Mi respondis al mi kaj al la orakolo, ke mi preferas esti kiel mi estas.

Pro tiu ekzamenado, Atenanoj, mi akiris multajn malamikojn, kiuj estis tiel danĝeraj kaj detruemaj ke ili kaŭzis multajn kalumniojn. Krome mi gajnis la reputacion esti saĝulo, ĉar la ĉeestantoj ĉiam kredas ke mi bone scias tiujn aferojn, pri kiuj mi ekzamenas aliajn homojn. Ŝajne, sinjoroj, nur la dio estas vere saĝa, kaj en tiu orakolo li diris, ke homa saĝo valoras malmulton aŭ nenion. Kvankam li ŝajne parolas pri Sokrato, li nur uzas mian nomon kaj faras el mi ekzemplon, kvazaŭ dirante: "Tiu inter vi estas la plej saĝa, sinjoroj, kiu kiel Sokrato rekonas ke, kiam temas pri saĝeco, li vere valoras nenion."

Ankoraŭ nun mi rondiradas laŭ la volo de la dio por serĉi kaj ekzameni iun ajn kiu ŝajnas saĝa, ĉu samurbano aŭ fremdulo, kaj se mi trovas ke li ne estas saĝa, mi montras tion por servi la dion. Pro tiu

okupado mi ne havas tempon fari ion menciindan, ĉu pri ŝtataj aŭ privataj aferoj, kaj rezulte mi estas tre malriĉa por mia servo al la dio.

Krome, tiuj inter la junularo kiuj havas plej da libertempo, la filoj de riĉuloj, sekvas min sen mia instigado, kaj ĝuas aŭdi min ekzameni homojn. Ofte ili imitas min, kaj prenas sur sin la ekzamenadon de aliaj homoj, kaj tiam ili trovas, ke ne mankas homoj kiuj opinias sin saĝaj, sed scias malmulton aŭ nenion. Do la ekzamenitoj koleras, ne kontraŭ si sed kontraŭ mi, kaj diras ke Sokrato estas fripono, kiu koruptas la junularon. Tamen, se oni demandas kiel li faras tion kaj kion li instruas, ili havas nenion por diri, kaj por ne resti senvortaj ili ripetas la kutimajn akuzojn kontraŭ filozofoj, kaj diras ke li parolas pri aferoj en la ĉielo kaj sub la tero, proklamas ateismon kaj faras la pli malbonan argumenton la pli forta. La veron, tamen, ili ne volas diri: ke evidentiĝis ke ili scias nenion, dum ili pretendas scii ion. Do, laŭ mi, ĉar ili estas ambiciaj, senskrupulaj kaj multnombraj, kaj parolas kontraŭ mi persvade kaj laŭplane, ili jam delonge plenigis viajn orelojn, kaj nun forte kalumnias min. Pro tio Meleto, Anito kaj Likono atakis min. Meleto koleras pro la poetoj, Anito por la metiistoj kaj la politikistoj kaj Likono por la oratoroj. Kiel mi jam komence diris, estus mirinde se mi kapablus en la mallonga tempo forigi el vi la antaŭjuĝon, kiu jam tiel kreskis. Jen la vero, Atenanoj. Mi diris ĝin kaj kaŝis nenion, grandan aŭ malgrandan. Mi scias, ke pro tiuj aferoj oni malamas min, kaj tiu malamo pruvas, ke mi diras la veron. Tia estas la kalumnio kaj la kaŭzo de la akuzo. Se vi pristudas la aferon, vi trovos ke estas tiel.

Ĉi tio sufiĉu por vi kiel defendo kontraŭ la akuzoj de miaj unuaj akuzantoj. Nun mi defendos min kontraŭ Meleto, tiu bona homo kaj patrioto, kiel li nomas sin, kaj kontraŭ miaj lastaj akuzantoj. La dokumento diras ke Sokrato kulpas, ĉar li koruptas la junularon kaj ne kredas je la dioj kiujn la ŝtato akceptas, sed je iaj novaj dioj. Tiu estas la akuzo, kaj mi pritraktos ĝin, punkton post punkto. Ĝi diras ke mi kulpas, ĉar mi koruptas la junularon sed, Atenanoj, mi deklaras ke Meleto mem kulpas. Li frivole traktas gravajn aferojn, ĉar li senkaŭze

akuzas homojn kaj li ŝajnas sin zorga kaj serioza pri aferoj, kiuj al li estas indiferentaj. Mi provos montri al vi kiel statas la afero.

— Venu ĉi tien, Meleto. Ĉu ne, multe gravas al vi ke la junularo estu laŭeble bona?

— Certe.

— Do, diru al la tribunalo, kiu plibonigas ilin. Vi scias, sendube, ĉar tio al vi estas grava afero. Vi ja trovis unu kiu koruptas ilin, laŭ via diro, kaj vi akuzis min antaŭ la juĝistoj. Nun sciigu al ili, kiu plibonigas la junularon; diru kiu li estas.

Vi vidas, Meleto, ke vi estas silenta kaj havas nenion por diri. Ĉu tio ne ŝajnas al vi hontinda? Ĉu tio ne pruvas kion mi diris, ke la afero estas indiferenta al vi? Tamen, mia bonulo, diru kiu plibonigas ilin.

— La leĝoj.

— Sed, estimata sinjoro, tion mi ne demandis. Kiu homo, unue, konas tiujn leĝojn?

— Ĉi tiuj juĝistoj, Sokrato.

— Kion vi volas diri, Meleto? Ĉu ĉi tiuj sinjoroj povas eduki la junulojn kaj plibonigi ilin?

— Certe.

— Ĉu ĉiuj, aŭ nur kelkaj el ili?

— Ĉiuj.

— Je la nomo de Hera, jen bona novaĵo! Do abundas bonfarantoj. Kion pri la ĉeestantoj; ĉu ili plibonigas la junularon aŭ ne?

— Jes, ankaŭ ili.

— Kaj la Konsilantaro?

— Jes, ankaŭ la Konsilantaro.

— Nu, Meleto, ĉu la anoj de la Popola Asembleo koruptas la junulojn aŭ plibonigas ilin?

— Ankaŭ ili plibonigas la junulojn.

— Do, ŝajnas ke ĉiuj Atenanoj plibonigas la junularon. Nur mi koruptas ilin. Ĉu vi diras tion?

— Jes, tion certe mi diras.

— Jen ega malfeliĉo, pri kiu vi akuzas min! Sed respondu al tio. ĉu vi opinias, ke la sama pravas pri ĉevaloj? Ke ĉiuj homoj plibonigas, kaj nur unu koruptas ilin? Ĉu ne, male, ilin plibonigas nur unu, aŭ maksimume, malmultaj personoj, la ĉevaldresistoj, sed la plejmulto, kiam ili provas dresi aŭ uzi ĉevalojn, koruptas ilin? Ĉu tio ne pravas, Meleto, pri ĉevaloj kaj aliaj bestoj? Tio certe pravas, ĉu vi kaj Anito konsentas aŭ ne. La junularo vere estas bonŝanca, ĉar nur unu koruptas, kaj ĉiuj aliaj plibonigas ilin. Tamen, Meleto, tio sufiĉas por montri ke la junularo ne gravas al vi. Vi montris vian indiferenton. La afero, pri kiu vi akuzas min, tute ne gravas al vi.

Diru al mi ankaŭ, Meleto, je la nomo de Zeŭso, ĉu estas pli bone vivi inter bonaj aŭ malbonaj civitanoj. Respondu, amiko, mi ne faras malfacilan demandon. Ĉu ne la malbonaj faras malbonon al siaj proksimuloj, kaj la bonaj bonon?

— Certe.

— Ĉu ekzistas iu, kiu volas havi malprofiton prefere ol profiton de siaj proksimuloj? Respondu, mia bonulo. La leĝo postulas respondon de vi. Ĉu iu volas malprofiti?

— Certe ne.

— Do vi akuzas min ĉi tie, ĉar mi koruptas la junularon. Ĉu mi faras tion intence aŭ senintence?

— Mi diras intence.

— Kion, Meleto? Ĉu vi, pli juna ol mi, estas tiom pli saĝa ol mi, ke vi jam eltrovis ke malbonuloj ĉiam faras malbonon al siaj proksimuloj kaj bonuloj bonon? Kaj mi estas tiel profunde nescianta, ke mi ne scias ke, farante iun el miaj proksimuloj malbona, mi ricevos ion malbonan de li? Ke mi faras tion malbonan intence, kiel vi diras? Tion vi ne kredigas al mi, nek laŭ mi al iu alia, Meleto. Tamen, aŭ mi ne koruptas, aŭ se mi koruptas, mi faras tion senintence. Do ambaŭ-okaze vi mensogas. Se mi faras ĝin senintence, la leĝo ne postulas ke vi akuzu min pri tiaj senintencaj misfaroj, sed vi devas private admoni

kaj instrui min. Estas ja evidente, ke mi ne plu faros tion kion mi faris senintence, se mi lernos kiel fari pli bone. Vi, tamen, evitis paroli al mi kaj instrui min. Tion vi ne volis fari, sed vi akuzas min antaŭ la tribunalo, kie laŭ la leĝo oni devas akuzi ne tiujn, kiuj meritas instruon, sed punon.

Tamen, kiel mi jam diris, Atenanoj, estas evidente ke Meleto neniam ĝenis sin pri tiaj aferoj, multe aŭ malmulte. Nun diru al mi, Meleto, kiel laŭ vi mi koruptas la junularon. Ĉu mi, kiel vi skribis en la akuzo kontraŭ mi, instruas ilin malkredi je la dioj kiujn la ŝtato akceptas, sed kredi je iaj novaj dioj? Ĉu tio estas la instruado, per kiu laŭ vi mi koruptas ilin?

— Certe, tion mi diras.

— Do, Meleto, je la nomoj de tiuj samaj dioj pri kiuj ni parolas, faru tion pli klara al mi kaj al tiuj sinjoroj, ĉar mi ne povas eltrovi, ĉu vi diras ke mi instruas homojn kredi je iuj dioj, kaj tiuokaze mi nepre kredas je ili, do ne povas esti tute ateisto kaj pri tiu krimo ne kulpas. Ĉu vi diras, do, ke mi kredas ne je la dioj kiujn la ŝtato akceptas, sed je aliaj dioj? Aŭ, ĉu vi akuzas min, ke mi tute ne kredas je iuj dioj, kaj instruas tiun malkredon al aliaj homoj?

— Tion mi diras, ke vi tute ne kredas je iuj dioj.

— Pro kio vi diras tion, vi mirinda Meleto? Ĉu mi ne kredas, kiel ĉiuj aliaj homoj, ke la suno kaj la luno estas dioj?

— Ne, juĝistoj, je Zeŭso, tion li ne kredas. Li diras, ke la suno estas ŝtono kaj la luno tero.

— Kara Meleto, ĉu vi imagas ke Anaksagoro estas la akuzito? Ĉu vi tiel malŝatas ĉi tiujn sinjorojn, kaj konsideras ilin tiel malkleraj, ke ili laŭ vi ne scias, ke tiuj estas la opinioj de Anaksagoro el Klazome-ne, kies libroj estas plenŝtopitaj de tiaj aferoj? Do, ŝajne, la junuloj lernas tion de mi, dum ili povas aŭdi tiujn ideojn en la teatro pro pago de unu draĥmo, kaj priridi Sokraton, kiam li pretendas ke tiuj estas liaj opinioj; kaj vere, ili estas strangaj! Diru, je Zeŭso, ĉu vi vere opinias, ke mi kredas je neniu dio?

— Je Zeŭso, vi kredas ke ne ekzistas iu ajn dio.

— Neniu kredos tion, Meleto, kaj eĉ ne vi mem, laŭ mi. Atenanoj, tiu homo ŝajnas al mi aroganta kaj senbrida; li skribis tiun akuzon pro manko de prudento kaj juna ventkapeco. Li kvazaŭ faras enigmon por provi min: ĉu la saĝa Sokrato rimarkas, ke mi parolas neserioze kaj kontraŭdiras min?, aŭ mi trompos lin kaj la aliajn aŭskultantojn? Ĉar laŭ mi li kontraŭdiras sin en la akuzo; li kvazaŭ diras: Sokrato estas krimulo, ĉar li ne kredas je dioj, sed li kredas je dioj. Do li kondutas neserioze.

Do, ni esploru, sinjoroj, kion li ŝajne volas diri. Vi, Meleto, respondu, kaj vi, sinjoroj, bonvolu memori kion mi jam antaŭe petis al vi, ke vi ne interrompu min kiam mi parolas laŭ mia kutimo. Meleto, ĉu iu homo kredas, ke ekzistas homaj aferoj, sed ne homoj? Li respondu, sinjoroj, kaj ne daŭre interrompadu min. Ĉu iu kredas ke ne ekzistas ĉevaloj, sed tamen kredas je ĉevalaj aferoj; ĉu iu kredas ke ne ekzistas flutistoj, sed tamen kredas je aferoj kiuj rilatas al flutludo? Ne, mia bona amiko, tia homo ne ekzistas; tion mi diras al vi kaj la aliaj ĉeestantoj, ĉar vi ne volas respondi. Sed vi devos respondi al tio: ĉu iu kredas, ke ekzistas diaj aferoj, sed ne diaj estaĵoj?

— Ne, neniu.

— Dankon pro via respondo, kvankam ĝi venis kontraŭvole. Do vi diris, ke mi instruas ke ekzistas diaj aferoj, malnovaj aŭ novaj. Jen viaj propraj vortoj, ĉar vi ĵuris tion en via akuzo. Se mi kredas je diaj aferoj, mi nepre kredas je diaj estaĵoj, ĉu ne? Jes, pro la manko de via respondo mi supozas ke vi konsentas. Pri tiuj diaj estaĵoj, ĉu ni ne rigardas ilin kiel diojn aŭ diidojn? Jes aŭ ne?

— Jes, certe.

— Do, laŭ vi, mi kredas je diaj estaĵoj, kaj laŭ vi diaj estaĵoj iasence estas dioj. Jen mia pruvo, ke vi parolas per enigmoj kaj ŝercoj. Laŭ vi mi ne kredas je dioj, kaj tamen kredas je diaj estaĵoj. Eble tiuj estas eksterleĝaj idoj de dioj kun nimfoj aŭ iuj aliaj, kiel oni ja diras. Kiu povas kredi je idoj de dioj sen kredi je dioj? Same strange estus kredi, ke

muloj estas idoj de ĉevaloj kaj azenoj, kaj kredi ke ne ekzistas ĉevaloj aŭ azenoj.

Nu, Meleto, ne estas dubinde, ke vi skribis tiun akuzon nur por provi nin, aŭ eble ĉar vi ne povis akuzi min pri iu vera krimo. Sed kred-igi al iu inteligenta homo, ke la sama homo povas kredi je aferoj, kiuj rilatas al diaj estaĵoj kaj dioj, kaj tamen ne kredi je diaj estaĵoj, dioj aŭ duondioj, tion mi trovas neebla.

Vere, Atenanoj, mi ne kulpas pri tio, pri kio Meleto akuzas min, kaj mi opinias, ke mi ne bezonas longan apologion por pruvi tion. Tamen mi jam antaŭe diris al vi, ke multaj homoj malamas mim. Tio estas la vero, kaj pro tio eble mi estas kondamnita, ne pro Meleto aŭ Anito, sed pro la kalumnioj kaj malamo de multaj homoj. Pro tio multaj aliaj bonaj homoj estis kaj estos kondamnitaj, kaj ne ekzistas danĝero ke mi estos la lasta.

Sed eble iu diros: “Ĉu vi ne hontas, Sokrato, ĉar vi sekvis tian karieron, ke nun vi estas en danĝero de mortpuno?” Al tiu homo mi respondus: “Vi malpravas, amiko, se vi opinias ke taŭga homo devus pripensi la ŝancojn de vivo aŭ morto antaŭ ol li faras ion, anstataŭ demandi ĉu ĝi estas bona aŭ malbona, kaj ĉu ĝi estas la ago de bona aŭ malbona homo. Laŭ via opinio, do, ĉiuj herooj, kiuj mortis en la Troja milito, estas malŝatindaj, precipe Aĥilo, filo de Tetiso, ĉar li malatentis la danĝeron, prefere ol fari ion hontindan. Lia patrino, kiu estis diino, alparolis lin per tiuj vortoj, se mi bone memoras, kiam li intencis mortigi Hektoron: “Filo, se por venĝi vian kunulon Patroklon vi mortigos Hektoron, vi mem mortos; via morto baldaŭ sekvos tiun de Hektoro”. Tamen, kvankam li aŭdis antaŭdiri sian morton, li malatentis la danĝeron, kaj pli ol tiun timis vivi kiel malkuraĝulo, kiu ne venĝis sian amikon. “Mi mortu tuj”, li diris, “kiam mi punis la malbonfarinton, prefere ol resti apud la pruhavaj ŝipoj primokata, kiel malutila ŝarĝo sur la tero”. Ĉu vi opinias, ke li timis morton aŭ danĝeron?

Jen la vero, Atenanoj; kien ajn la homo metas sin, ĉu pro sia propra elekto aŭ laŭ ordono de siaj regantoj, tie laŭ mi li devas resti

kaj alfronti dangeŝon. Li timu nek la morton, nek ion alian, pli ol fari hontindaĵon. Mi restis sur mia posteno, Atenanoj, kien metis min la regantoj kiujn vi elektis, ĉe Potidea, Amfipolis kaj Delio, kaj tie mi alfrontis la morton same kiel aliaj homoj. Estus strange se nun, kiam laŭ mia opinio kaj konvinko Dio ordonis min vivi kiel filozofo kaj ekzameni min mem kaj aliajn, mi timus la morton, aŭ ion alian, kaj forlasus mian postenon. Tio vere estus stranga konduto, kaj se mi farus tion, mi meritus ke oni akuzu min pri ateismo. Tiukaze mi malobeus la orakolon, kaj timus la morton, kaj opinius ke mi estas saĝa, dum mi ne estas. Neniu ja scias, ĉu la morto eble estas la plej bona afero por la homo; tamen, oni timas ĝin kvazaŭ ĝi estus la plej malbona. Ĉu tio ne estas la plej hontinda nescio: opinii ke oni scias ion, kion oni ne scias? Eble, sinjoroj, mi malsimilas al la plejmulto rilate al tiu afero. Se mi opinias min pli saĝa ol aliaj, tio estas nur, ĉar ne havante sufiĉan scion pri kio okazos post morto, mi ne pretendas havi tiun scion. Sed agi maljuste, malobei mian superulon, ĉu dion aŭ homon, pri tio mi scias ke ĝi estas malbona. Do mi timas tion, kio laŭ mia scio estas malbona, kaj mi ne forkuros pro timo de tio, kio eble estas bona.

Ĉifoje, eble, vi absolvos min, malgraŭ Anito, kiu diras ke oni devus, aŭ tute ne venigi min antaŭ la tribunalo, aŭ ĉar mi venis, kondamni min al mortpuno ĉar, kiel li diris, se mi eskapus, viaj filoj agus laŭ la instruado de Sokrato kaj tute koruptiĝus. Se vi do dirus al mi: "Sokrato, ĉifoje ni ne fidos Aniton, sed ni absolvos vin, kondiĉe ke vi ne daŭrigu vian serĉon kaj ne plu okupu vin pri filozofio, kaj se ni trovos ke vi faras tion denove, vi mortos. Kun tiu kondiĉo ni absolvos vin," tiam mi respondus: "Atenanoj, mi amas kaj honoras vin, sed mi obeos Dion prefere ol vin. Dum mi spiros kaj havos vivkapablon, mi ne ĉesos esti filozofo, admoni vin, kaj alparoli iun ajn el vi, kiun mi renkontos. Kaj al tiu homo mi diros: bona amiko, vi estas Atenano, civitano de urbo kiu estas la plej granda kaj plej fama pro gloro kaj potenco, kaj vi zorgas pri riĉo por havi plejebulon da ĝi, pri gloro kaj honoro. Tamen, ĉu vi ne hontas, ĉar vi tute ne zorgas pri kompreno,

kaj vero, kaj pri via animo por fari ĝin laŭeble bona? Kaj se iu pridubas miajn vortojn, kaj diras ke li fakte prizorgas tiujn aferojn, mi ne tuj lasos lin, forirante, sed mi pridemandos, ekzamenos kaj provos lin. Kaj se ŝajnas al mi, ke li ne havas virton, sed opinias havi ĝin, mi riproĉos lin, ĉar li traktas plej grave tion, kio estas la malplej grava, kaj li tro-estimas la malplivaloran. Tion mi faros al iu ajn, junulo aŭ maljunulo, fremdulo aŭ civitano, sed precipe al vi, samurbanoj, ĉar vi estas la plej proksimaj al mi. Vi sciu, ke Dio postulas tion de mi, kaj laŭ mi la plej bona servo, kiun ricevis la ŝtato, estas mia servo al Dio.

Ĉar la tutan tempon mi iras de unu al alia kaj persvadas vin, ĉu junajn aŭ maljunajn, ke via ĉefa zorgo ne estu via korpo aŭ via riĉo, sed ke vi prizorgu vian animon, por fari ĝin laŭeble bona. Kaj mi diras, ke ne el posedaĵoj venas virto, sed el virto venas posedaĵoj kaj ĉio, kio estas bona, ĉu privata aŭ publika. Se per tia parolado mi koruptas la junularon, ĝi do nepre devas esti malbona, kaj se iu asertas ke mi diras ion alian, li diras sensencaĵon. Kaj mi aldonus: "Atenanoj, ĉu vi fidas Aniton aŭ ne, kaj ĉu vi absolvos min aŭ ne, tion mi faros kaj nenion alian, eĉ se mi devos morti pro ĝi."

Ne interrompu min, Atenanoj, sed kiel mi jam antaŭe petis vin, restu trankvilaj, kion ajn mi diros, kaj aŭskultu min, ĉar laŭ mi vi profitos aŭskultante min. Mi intencas nun diri ion alian, kaj eble vi ekkrios pri ĝi, sed bonvolu ne fari tion. Estu certaj, ke se vi mortigos min ĉar mi estas kiel mi estas, vi ne nocos min tiom kiom vin mem. Nek Meleto, nek Anito nocos min; ili ne kapablas fari tion. Mi kredas ke ekzistas eterna leĝo, laŭ kiu malbonulo ne povas noci pli bonan homon. Ili povas mortigi aŭ ekzili min, aŭ forpreni miajn civitanajn rajtojn. Eble ili, kaj ankaŭ aliaj, opinias ke tiuj aferoj estas malbonegaj. Mi ne opinias same; laŭ mi estas pli malbona tio, kion ili nun faras, maljuste mortigi homon. Tial, Atenanoj, mi defendas min ne pro mi mem, kiel eble vi pensas, sed pro vi, por ke kondamnante min vi ne erare forĵetu donacon de Dio. Ĉar se vi mortigos min, vi ne facile trovos iun similan, iun kiun Dio surmetis sur la ŝtaton kiel tabanon, se mi rajtas uzi komparon eble

ridigan. La ŝtato estas kiel granda purrasa ĉevalo, kiu malvigligiĝis pro sia grandeco kaj bezonas tabanon por vigligi ĝin. Ŝajnas al mi ke simile Dio surmetis min sur la ŝtaton. Tial ĉie, dum la tuta tago, mi vekas, persvadas kaj riproĉas ĉiujn el vi. Tian homon vi ne facile trovos, kaj se vi sekvos mian konsilon, vi lasos min vivi. Sed eble, ĉar vi estas incititaj, kiel dormintoj subite vekitaj, vi direktos baton al mi kaj vi facile povos mortigi min, kiel volas Anito, kaj poste dormi trankvile dum la resto de via vivo, almenaŭ se Dio, zorgante pri vi, ne sendos iun alian. El mia konduto vi facile povos konkludi, ke mi estas tia donaco de Dio al la ŝtato, ĉar apenaŭ ŝajnas homece ke mi neglektis miajn proprajn aferojn kaj ne prizorgis miajn hejmajn interesojn dum tiom da jaroj, sed dume estis okupata pri viaj aferoj, kaj zorgis pri ĉiu el vi kiel patro aŭ pliaga frato, kaj persvadis vin alstrebi virton. Tamen, se pro tio mi gajnus kaj ricevus pagon, mi havus bonan kialon por fari ĝin, sed vi vidis mem ke miaj akuzantoj, kiuj akuzis min pri io ajn malbona, tamen ne estis tiel senhontaj ke ili altiris atestanton por diri ke mi faris ĝin pro pago. Sed mi havas taŭgan ateston ke mi diras la veron: mia malriĉeco.

Eble ŝajnas strange ke mi okupas min, irante de unu al alia de vi kaj donante konsilojn al vi private, sed ne riskas prezenti min en via asembleo kaj konsili la ŝtaton. Tio havas kialon, kaj vi jam aŭdis ĝin de mi en multaj lokoj: io dia aŭ spirita alvenas al mi, la sama kiun Meleto karikature mencias en sia akuzo. Ĝi estas voĉo, kiu ofte venas al mi ekde mia infanaĝo. Ĝi ĉiam kontraŭstaras ion kion mi volas fari, sed neniam antaŭenpuŝas min fari ion. Tiu malhelpas ke mi agu politike, kaj laŭ mi tion ĝi faras prave, ĉar vi sciu, Atenanoj, se mi estus partopreninta politikan agadon mi jam delonge estus pereinta, kaj tiel mi ne helpus vin aŭ min. Ne koleru, se mi diras al vi la veron: ne ekzistas homo kiu povus savi sin, se li kontraŭstarus vin aŭ iun alian homamason kaj provus haltigi la multajn maljustaĵojn kaj kontraŭleĝajn agojn, kiuj okazas en la ŝtato. Tial la defendanto de homaj rajtoj, se li volas savi sin dum almenaŭ mallonga tempo, devas agi private, ne publike.

Mi donos al vi pli fortan pruvon pri tio, ne per vortoj sed per

faktoj, kiujn vi devas respekti. Aŭdu do tion, kio okazis al mi, por ke vi sciu, ke mi neniam konsentis fari maljustecon pro timo de morto, sed ke mi estis preta tuj pereji prefere ol fari tion. Mi rakontos al vi ion eble tedan, ĉar temas pri tribunalo, tamen veran. Neniam, Atenanoj, mi tenis oficon en la ŝtato krom unufoje, kiam mi estis ano de la konsilantaro. Sance mia "tribo" tiam deĵoris, kaj oni tiam intencis juĝi kune, ne individue, la dek generalojn, kiuj ne kolektis la falintojn post la marbatalo. Tio estis kontraŭleĝa, kiel poste vi ĉiuj konfesis, kaj mi estis la sola en la tuta aro de kvindek, kiu rifuzis agi kontraŭleĝe, kaj voĉdonis kontraŭe. La oratoroj estis pretaj akuzi min, kaj postuli ke oni arestu min, kaj vi ĉiuj kriis ke ili faru tion, sed mi preferis riski la danĝeron kaj subteni leĝon kaj justecon, ol agi maljuste kune kun vi timante karceron aŭ morton. Tio okazis, kiam la ŝtato ankoraŭ estis demokrata, kaj poste, kiam regis la Oligarkio, la Trideko vokis nin al la Ronda Ĉambro, kaj ordonis al kvin homoj, inkluzive de mi, iri al Salamiso kaj konduki ĉi tien Leonon la Salamisanon, por ke li estu mortigota. Ili jam donis tiajn ordonojn al aliaj, por ke laŭeble multe da homoj kulpu kune kun ili. Tiam mi pruvis per ago, ne per vorto, ke la morto ne gravas al mi eĉ unu pencon, se vi permesas ke mi diru ĝin krude, sed ke treege gravas al mi ke mi ne faru ion maljustan aŭ kontraŭdian. Tiu registaro, kvankam potenca, ne povis devigi min fari maljustaĵon, do forlasinte la Rondan Ĉambron mi iris hejmen, dum la aliaj iris al Salamiso por alkonduki Leonon. Pro tio mi eble estus mortigita, se ne tiu registaro estus falinta baldaŭ poste. Multaj homoj povas atesti, ke tio estas vera.

Ĉu vi opinias, ke mi povus travivi tiom da jaroj, se mi partoprenus politikan agadon, agus laŭdeve kiel honesta homo kaj subtenus justecon? Certe ne, Atenanoj, nek mi, nek iu alia. Tamen dum mia tuta vivo mi montris min la sama homo, ĉu en publikaj aferoj, kiam mi enmiksiĝis en ilin, ĉu en privataj. Neniam mi cedis al maljusteco por plaĉi al iu ajn, inkluzive de tiuj, kiujn miaj kalumniantoj nomas miaj lernantoj. Sed mi neniam estis ies instruisto. Se iu homo, juna aŭ maljuna, deziris

aŭskulti min dum mi plenumis mian taskon, mi neniam rifuzis lin. Mi ne diskutis pro pago, kaj mi ne rifuzis diskuti sen pago. Tamen mi estis preta aŭskulti demandojn de riĉuloj aŭ malriĉuloj, kaj se iu volas, li rajtas aŭskulti kion mi diras, kaj respondi al mi. Ĉu iu pro tio plibonigas, pri tio mi ne respondecas, ĉar mi neniam promesis doni klerecon al iu aŭ instrui iun. Do se iu diras, ke li aŭdis kaj lernis ion de mi private, kion aliaj ne scias, estu certaj ke li ne parolas la veron.

Tamen, kial tiom da homoj ĝuas esti kun mi dum longa tempo? Vi, sinjoroj, jam aŭdis la kialon, ĉar mi diris al vi la tutan veron. Ili ĝuas aŭdi min ekzameni tiujn, kiuj pretendas esti saĝaj sed ne estas, kaj fakte, tio estas amuza afero. Kiel mi ĵus diris, mi faras tion laŭ dia ordono, pro orakoloj, songoj kaj ĉiuj aliaj signoj, per kiuj iam ajn homoj ricevis dian gvidadon. Tio, Atenanoj, estas vera kaj facile pruvebla. Se mi koruptas junulojn, kaj jam antaŭe koruptis ilin, tiuj kiuj nun estas plenaĝaj, kaj trovis ke kiam ili estis junaj mi malbone konsilis ilin, nun devas veni antaŭ la tribunalo por akuzi min kaj postuli, ke oni punu min. Kaj se ili ne volas fari tion, iliaj patroj, fratoj kaj aliaj parencoj, se mi faris malbonan al iu en ilia familio, nun devas memori ĝin kaj postuli, ke oni punu min.

Multaj el ili sendube ĉeestas, kaj mi vidas ilin. Jen unue Kritono, mia samaĝulo el la sama distrikto, patro de Kritobulo tie. Krome Lisianas el Sfetto, patro de Eshino tie, kaj ankaŭ Antifono el Kefiso, patro de Epigeno. Jen aliaj, kies fratoj ofte estis kun mi: Nikostrato, filo de Teozotido kaj frato de Teodoto. Teodoto mem mortis, do ne povas malhelpi lin. Jen Paralo, filo de Demodoko, kies frato estas Teago. Jen ankaŭ Adimanto, filo de Aristono, kies frato Platono ĉeestas, kaj Ajantodoro, kaj la frato Apollodoro. Multajn aliajn mi povus mencii, unu el kiuj Meleto nepre devus alvoki kiel atestanton dum sia parolado. Se li forĝesis fari tion, li faru ĝin nun. Mi cedos lokon al li; li parolu, se li havas ion por diri. Sed, sinjoroj, vi trovos la malon. Ĉiu el ili estas preta subteni min, kiu laŭ Meleto kaj Anito estas malbonfarinto, kiu koruptis iliajn parencojn. Eble la koruptitoj

havas kialon subteni min, sed se temas pri iliaj parencoj, la nekoruptitaj kiuj nun estas maljunuloj, kiun kialon ili povus havi subteni min, krom la bona kialo: ke ili scias ke mi parolas la veron, kaj Meleto mensogas?

Nu, sufiĉe, sinjoroj, jen la faktoj per kiuj mi defendas min, kaj mi povus aldoni aliajn similajn. Tamen, eble iu el vi estas ĝenita, memorante kion li mem faris okaze de malpli grava akuzo, kiam li petegis la juĝistojn kun multaj larmoj, kaj alkondukis siajn gefilojn por veki ilian kompaton, kaj ankaŭ aliajn parencojn kaj multajn amikojn, dum mi evidente tute ne faras tion, kvankam en ekstrema danĝero. Eble iu el vi pro tiu memoro malsimpatias al mi kaj pro kolero voĉdonos kontraŭ mi. Se iu el vi tiel sentas – mi ne antaŭvidas tion, sed tio povas esti – mi opinias, ke mi rajtas diri al li: “Bona amiko, mi ankaŭ havas parencojn, ĉar kiel diras Homero ‘ne ligna aŭ ŝtona mi estas, sed homa’. Atenanoj, mi havas familianojn, eĉ tri filojn; unu estas junulo kaj la aliaj ankoraŭ infanoj. Sed neniun el ili mi vokos ĉi tien por ke ili petu, ke vi absolvu min. Kaj kial mi ne faras tion? Ne, Atenanoj, ĉar mi estas obstina aŭ ĉar mi ne respektas vin, kaj alia afero estas la demando ĉu mi povos fronti la morton kuraĝe aŭ ne. Laŭ mia opinio ne estus honorinde al mi, aŭ vi, aŭ la urbo, se mi farus tion je mia aĝo kaj kun mia reputacio, ĉu tiu estas vera aŭ malvera. Ekzistas ja ĝenerala opinio, ke iel Sokrato superas aliajn homojn. Se iu el vi havas la reputacion esti pli saĝa, aŭ pli kuraĝa, aŭ aliamaniere pli virta ol aliaj homoj, estus hontinde se vi kondukis tiel. Ofte mi vidis homojn kun bona reputacio, kiuj kondukis strange antaŭ tribunalo. Ŝajne ili opiniis, ke la morto estas io terura, kaj ke ili estus senmortaj se vi ne mortigus ilin. Laŭ mi, tiaj homoj hontigas la urbon, ĉar ŝajnas al fremduloj, kvazaŭ tiuj Atenanoj, kiuj estas elstaraj pro virtoj, tiuj kiujn la samurbanoj elektis por registaj kaj aliaj honoroj, kondutas ne pli bone ol virinoj. Ni, Atenanoj, kiuj havas reputacion, tiajn aferojn tute ne devas fari, kaj vi devas ne toleri ke ni tiel konduku, sed montri ke vi kondamnos homon, kiu tiel petegas kompaton kaj ridindigas nian urbon, prefere ol kondamni homon kiu kondutas trankvile.

Ŝajnas al mi maljuste, sinjoroj, ke oni petegas la juĝistojn kaj estas absolvita pro peto, kaj ne nur pro la reputacio. Oni devas instrui kaj persvadi la juĝiston. Juĝisto sidas en tribunalo ja ne por juĝi laŭ favoro sed laŭ justeco; li juris ke li ne favoros homon kiu plaĉas al li, sed juĝos laŭ la leĝoj. Do ni devas ne alkiutimigi vin al rompado de via ĵuro, kaj vi devas ne alkiutimiĝi al tio. Se ni farus tion, mi kaj vi agus malpie. Do ne postulu, Atenanoj, ke mi faru ion, kion mi opinias maljusta kaj malpia, kaj precipe, je Zeŭso, ĉar tiu homo Meleto akuzas min pri malpieco. Evidente, se mi persvadas vin kaj kvazaŭ devigus vin per petoj agi kontraŭ via ĵuro, mi instruus vin ne kredi je dioj, kaj tiam mi mem akuzus min pri ateismo, dum mi defendas min kontraŭ tiu akuzo. Sed male, Atenanoj, mi estas kredanto, eĉ se miaj akuzantoj ne estas, kaj mi lasas al vi kaj al Dio ke vi juĝu min tiel, kiel ŝajnas al vi plej bone por mi kaj por vi mem.

*(La tribunalo voĉdonas, kaj kondamnas Sokraton per 281 voĉoj kontraŭ 220. Meleto proponas mortpunon. Sokrato nun rajtas fari kontraŭproponon.)*

Mi ne ĉagreniĝas, sinjoroj, pri la juĝo, kiun pri mi vi proklamis. Ĝi havas multajn kaŭzojn, kaj la okazaĵo ne surprizas min. Nur surprizis min la rilato de la nombro de voĉoj. Mi ja atendis, ke miaj kontraŭuloj estos multaj, ne malmultaj, sed nun evidentiĝas, ke se nur tri-dek estus donintaj siajn voĉojn aliflanke, mi estus absolvita. Eĉ ŝajnas al mi, ke koncerne Meleton mi estas absolvita, kaj krome ĉiu povas kompreni, ke se Anito kaj Likono ne subtenus lian akuzon, li ricevus monpunon de kvindek draĥimoj, ĉar li ne kaptis kvinonon de la voĉoj.

Tiu homo postulas por mi la mortpunon. Tiel estu, Atenanoj, sed kian punon mi mem kontraŭproponu? Certe tian punon, kian mi meritas, ĉu ne? Do, kion mi meritas suferi aŭ pagi pro la fakto, ke neniam dum mia vivo mi estis neniofaranto, sed neglektis la aferojn kiuj gravas al la plejmulto da homoj, nome mongajnado, familiaj inte-

resoj, estrado en milito, oratoraj sukcesoj kaj ŝtataj oficoj, kaj krome partioj kaj konspiroj en la urbo, ĉar mi konsideris min tro honesta por enmiksiĝi en tiajn aferojn kaj travivi. Mi ne iris tien, kie mi povis utili nek al vi, nek al mi mem, sed kien ajn mi opiniis ke mi povos fari plej da bono al ĉiu el vi private, tien mi iris. Mi admonis ĉiun el vi, ke li ne unue prizorgu siajn interesojn, sed unue provu fari sin laŭeble virta kaj saĝa, kaj ke antaŭ ol prizorgi la aferojn de la ŝtato, li prizorgu la ŝtaton mem, kaj ke li agu laŭ la sama ordo ankaŭ pri aliaj aferoj. Do, estante tia homo, kion mi meritas? Ion bonan, Atenanoj, se vi juĝas laŭ mia vera merito, kaj krome, ion bonan kiu konvenas al mi. Do, kio konvenas al homo, malriĉa sed bonfaranta, kiu bezonas liber-tempon por ke li povu admoni vin? Nenio ĝstus pli taŭga, Atenanoj, ol ricevi loĝadon kaj vivtenadon en la urbodomo. Certe tia homo meritas tion, pli ol iu kiu gajnis olimpian premion en ĉevalkonkurso aŭ ĉarkonkurso, ĉar tiu kaŭzas ke vi ŝajnas feliĉaj, sed mi penas ke vi estu feliĉaj, kaj ne al li mankas nutrado sed al mi. Do, se mi devas proponi justan punon laŭ merito, tiu estu senkosta loĝado en la urbo-domo.

Eble, dirante tion, mi ŝajnas defii vin, kiel antaŭe, kiam mi parolis pri plorado kaj petegado. Ne estas tiel, Atenanoj, tamen mi diras tion, ĉar mi estas konvinkita, ke mi neniam traktis iun el vi maljuste. Konvinki vin mi tamen ne povas, ĉar ni havas mallongan tempon por interparoli. Fakte mi opinias, ke se la leĝo ĉi tie, same kiel aliloke, postulus ke juĝo pri mortpuno bezonas kelkajn tagojn anstataŭ unu, vi estus konvinkitaj, sed ne estas facile refuti grandan kalumniadon en mallonga tempo. Tamen, estante konvinkita ke mi neniam faris maljustecon al iu, mi certe ne volas trakti min mem maljuste kaj diri, ke mi meritas ion malbonan. Kion mi timus? Ĉu eble la punon, kiun proponis Meleto por mi, kaj pri kiu mi deklaras, ke mi ne scias ĉu ĝi estas bona aŭ malbona? Ĉu anstataŭe mi elektu ion, pri kio mi scias ke ĝi estas malbona, kaj proponu tion kiel mian punon? Ĉu malliberecon? Sed kial mi dezirus vivi en malliberejo kiel sklavo de la Dekunuoj, la elektitaj aŭtor-

tatoj? Aŭ eble monpunon, kaj malliberecon ĝis mi pagos? Sed tio signifas la saman, kiel mi jam diris, ĉar mi ne havas monon por pagi. Ĉu la puno estu ekzilo? Eble vi volas akcepti tiun punon por mi. Sed mi estus tre viv-avida se mi elektus tiun! Ĉu mi estu tiel malracia? Vi, miaj samurbanoj, ne povas toleri miajn diskutojn kaj argumentojn; ili estis al vi tiel ĝenaj kaj abomenaj ke vi nun provas forigi min. Ĉu aliaj homoj toleros ilin pli volonte? Certe ne, Atenanoj! Agrabla vivo estus tiu, se mi irus eksterlanden je mia aĝo, ĉiam migrante kaj fuĝante de urbo al urbo! Mi jam scias, ke kien ajn mi iros, la junuloj volos aŭskulti min, same kiel ili faras ĉi tie. Se mi forpelos ilin, ili mem persvados la plejaĝulojn elpeli min, kaj se mi ne forpelos ilin, pro tio la patroj kaj parencoj elpelos min.

Eble iu diras: "Sokrato, ĉu vi ne povas vivi aliloke kaj resti silenta kaj trankvila?" Jen la afero plej malfacila por kredigi al vi. Ĉar se mi diras, ke tio estus malobei la dion, kaj ke pro tio mi ne povas resti trankvila, vi opinios ke mi parolas sensencaĵon kaj ne kredos min. Kaj se mi diras, ke la plej bona, kion la homo povas fari, estas ĉiutaga diskutado pri virto, vi eĉ malpli kredos min. Tamen estas tiel, sinjoroj, eĉ se mi ne facile konvinkos vin. Mi ne opinias, krome, ke mi meritas iun punon. Se tamen mi havus la monon, mi proponus monpunon kiun mi povus pagi, ĉar tio ne nocas min. Sed nun tio ne eblas, almenaŭ se ne vi postulos sumon tiel malgrandan ke mi povos pagi ĝin. Eble mi povus pagi la sumon de unu 'mina' arĝenta, do mi proponas tion. Tamen, Atenanoj, Platono, kiu estas ĉi tie, kaj Kritono, Kritobulo kaj Apollodoro konsilas, ke mi proponu tridek 'mina' kaj ili estos garanti-antoj. Do tion mi proponas, kaj ili sufiĉas por garantii al vi pagon de la mono.

*(La tribunalo denove voĉdonas kaj decidas la mortpunon)*

Malmulte da tempo vi gajnis, Atenanoj, sed pro tio vi gajnis la famon kaj ankaŭ la kulpon ke vi mortigis Sokraton, saĝan homon, kiel

diros tiuj, kiuj volas kritiki nian urbon. Ĉar kiuj volas riproĉi vin nomos min saĝa, eĉ se tia mi ne estas. Se vi atendus nur mallongan tempon, mia morto okazus nature; vi ja scias mian agon kaj ke mi estas maljuna kaj mortproksima. Mi diras tion ne al ĉiuj el vi, sed al tiuj, kiuj voĉdonis por mia morto. Krome, al tiuj samaj homoj mi diras: eble, Atenanoj, vi opinias, ke mia kondamno okazis ĉar mankis al mi vortoj, tiaj vortoj kiaj povus persvadi vin, kvazaŭ mi estus preta fari aŭ diri ion ajn por esti absolvita. Tute ne! Mi estis kondamnita ne pro manko de vortoj, sed pro manko de impertinento kaj de senhonteco, kaj pro la kialo ke mi ne volis diri al vi tiajn vortojn, kiajn vi volis aŭdi. Mi ne volis plori kaj lamenti, aŭ fari kaj diri multon kiu estus malinda je mi, kiel mi jam diris, tia kian vi kutime aŭdas de aliaj homoj. Mi tamen kredas, ke mi devas ne agi sklavece, eĉ en danĝero, kaj mi nun ne bedaŭras kiel mi defendis min; prefere mi mortos post tia defendo ol vivos post alia. Ĉar nek mi, nek alia homo rajtas fari ion ajn nur por eskapi morton, ĉu antaŭ tribunalo aŭ en milito. En batalo ofte okazas, ke iu homo povas savi sian vivon, se li forĵetas siajn armilojn kaj turnas sin petegante al la postkurantoj, kaj ekzistas multaj aliaj rimedoj per kiuj homo povas savi sin el danĝero, se li estas preta fari aŭ diri ion ajn. Ne estas malfacile eskapi la morton, sinjoroj, sed multe pli malfacile estas eskapi malbonecon, ĉar ĝi kuras pli rapide ol la morto. Nun la pli malrapida, la morto, kaptis min, kiu estas lanta kaj maljuna, sed miajn akuzantojn, rapidajn kaj lertajn, kaptis la pli rapida, la malboneco. Nun mi, kiun vi kondamnis al la morto, foriras, sed ili, kiujn la Vero kondamnis, iras al la puno de malico kaj maljusteco. Mi devas akcepti mian juĝon, kaj ili sian. Eble tio okazas kiel devis okazi, kaj laŭ mi ĝi estas laŭeble taŭga.

Sed nun mi deziras antaŭdiri al tiuj, kiuj kondamnis min, ion pri la estonteco, ĉar mi estas en la stato en kiu homoj estas plej profet-povaj, kiam ili estas proksimaj al la morto. Je Zeŭso, mi diras al vi, sinjoroj kiuj mortigas min, ke tuj post mia morto trafos vin juĝo multe pli severa ol la morto, al kiu vi kondamnas min. Vi faris tion, ĉar vi

atendis ke farante tion vi evitos la ekzamenadon de via vivo, sed mi antaŭdiras, ke la rezulto estos alia. Aperos pli da homoj por ekzameni vian vivon, tiuj kiujn mi bridis, kvankam vi ne sciis pri tio, kaj ju plu junaj ili estos, des pli severaj, kaj des pli ili ĝenos vin. Se vi opinias, ke mortigante homojn vi povos eviti riproĉojn pro via maljusta vivado, vi eraras. Tia evito estas nek ebla, nek honorinda, tamen ekzistas alia, kiu estas pli honorinda kaj pli facila: ke vi ne subpremu homojn, sed pli-bonigu vin mem, por ke vi estu laŭeble virtaj. Jen mia antaŭdiro al vi kiuj kondamnis min, kaj mi ne diros pli al vi.

Tamen, kun tiuj kiuj voĉdonis por mia absolveco, mi volonte diskutus pri la okazintaĵo, dum la regantoj estas okupataj pri aliaj aferoj, antaŭ ol mi iros al la loko kie mi devos morti. Bonvolu, sinjoroj, resti kun mi dume, ĉar nenio malebligas ke ni interparolu. Ĉar vi estas miaj amikoj, mi volas montri al vi la signifon de tio, kio okazis al mi. Miaj juĝistoj (kaj vi meritas ke mi nomu vin juĝistoj), al mi okazis io mirinda. Mia profeta spirita voĉo antaŭe ĉiam avertis min, eĉ pri malgravaj aferoj, kiam mi intencis fari ion eraran. Nun, kiel vi mem vidis, okazis al mi la plej granda malbono, almenaŭ tia ĝi povus esti, kaj tiel oni kutime rigardas ĝin. Tamen, nek kiam mi forlasis mian hejmon hodiaŭ, nek dum mia parolado, kiam mi intencis diri ion, la signalo de Dio kontraŭis min. Kvankam alifoje, dum mi parolis ĝi ofte haltigis min meze de miaj vortoj, nun en ĉi tiu afero ĝi ne avertis min kontraŭ iu ago aŭ vorto. Pro kiu kialo, laŭ mi? Mi diros tion al vi. Devas esti, ĉar la okazintaĵo estas bona por mi. Do certe ne pravas tiuj el ni, kiuj opinias ke la morto estas io malbona. Kio okazis al mi pravas tion konvinke, ĉar sendube mia kutima signalo kontraŭis min, se mi intencus fari ion malbonan.

Mi pripensu ankaŭ, kiel grandan esperon ni havas ke ĝi estas bona. La morto ja devas esti unu el du: aŭ la mortinto neniĝas kaj ne konscias pri io, aŭ, kiel oni diras, okazas ŝanĝo, per kiu la animo transiras al alia loko. Se ne ekzistas konscio, sed nur dormo, en kiu la dormanto eĉ ne sonĝas, la morto estas mirinda beno. Ĉar se iu devus elekti ĵun nokton,

en kiu li profunde dormis kaj eĉ ne songis, kaj kompari tiun kun aliaj noktoj kaj tagoj de sia vivo kaj deklari, post bona pripensado, kiom da noktoj kaj tagoj pli dolĉaj li spertis dum sia vivo, iu ajn homo laŭ mi, ne nur ordinarulo sed eĉ la Granda Reĝo, trovus malmultajn pli bonajn ol tiu nokto, kompare kun ĉiuj aliaj noktoj de sia vivo. Aliflanke, se la morto estas transiro al alia loko, kaj se estas vere, kiel oni diras, ke tie estas ĉiuj kiuj iam mortis, kio, miaj juĝistoj, povus esti pli bona ol tio? Se iu venas Hadeson kaj trovas sin libera de tiuj, kiuj pretendas esti juĝistoj, sed renkontas la verajn juĝistojn, kiuj laŭdire juĝas tie, kiel Minoo, Radamantis, Eako, Triptolemo kaj aliaj kiuj estis justaj dum siaj vivoj, ĉu tiu transiro estas io malbona? Kion oni ne donus por esti kune kun Orfeo, Museo, Hesiodo aŭ Homero? Mi, almenaŭ, volonte mortus multfoje, se tio estas vera. Ŝajnas mirinde al mi esti tie, kaj trovi la kuneston de Palamedo, Ajakso filo de Telamono, kaj aliaj kiuj antaŭ longe mortis pro maljusta juĝo. Kompari miajn spertojn kun iliaj ŝajnas al mi tute ne malagrabla, kaj la plej bona estus ekzameni kaj demandi homojn, kiel mi faras ĉi tie, kaj eltrovi kiu estas saĝa, kaj kiu imagas sin saĝa, sed ne estas. Kion oni ne donus, juĝistoj, por ekzameni tiun, kiu gvidis la grandan armeon al Trojo, aŭ Odiseon, aŭ Sisifon, aŭ milojn da aliaj viroj kaj virinoj, kiujn oni povus mencii. Esti kun ili, interparoli kaj ekzameni ilin estus senlima feliĉo. Certe en tiu mondo oni ne mortkondamnas iun pro fari tion; ili estas pli feliĉaj ol ĉi tie, kaj por la restanta tempo ili estas senmortaj, se la diro estas vera.

Sed vi ankaŭ, juĝistoj, havu bonan esperon pri la morto. Akceptu tion kiel veran: nenio malbona povas okazi al bona homo, ĉu vivanta aŭ mortinta, kaj liaj aferoj ne estas indiferentaj al la dioj. Kio okazis al mi ne okazis ŝance; estas klare al mi ke morti nun kaj liberiĝi el penoj estas la plej bona por mi. Pro tio mia signalo ne haltigis min. Mi ne koleras kontraŭ tiuj, kiuj akuzis kaj kondamnis min; tamen, ĉar ili ne faris ĝin kun tiu intenco, sed kun la intenco noci min, ili estas riproĉindaj. Unu aferon mi petis al ili. Kiam miaj filoj plenkreskos,

punu ilin, sinjoroj; turmentu ilin kiel mi turmentis vin, se vi opinias ke ili zorgas pri mono aŭ io alia pli ol pri virto, kaj se ili ŝajnigas esti io, dum ili estas nenio; riproĉu ilin kiel mi riproĉis vin, kaj diru ke ne gravas al ili tio, kio devus esti grava, kaj ke ili imagas esti io, dum ili valoras nenion. Se vi faros tion, vi juste traktos min kaj ankaŭ miajn filojn.

Nun alvenis la horo foriri, mi por morti, vi por vivi, sed kiu el ni iras al la pli bona sorto, tion scias neniuj krom Dio.



THE  
LIBRARY  
OF THE  
BIBLIOTHECA  
MUSEI HISTORICI  
ROMAE



FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO-PEPPEA

## KRITONO

*Sokrato.* Kial vi venis ĉihore, Kritono? Ĉu ne estas ankoraŭ frue?

*Kritono.* Jes, tre frue.

S. Ĉirkaŭ kioma horo?

K. Momenton antaŭ sunleviĝo.

S. Mi miras ke la karcergardisto volis enlasi vin.

K. Li jam al kutimiĝis al mi, Sokrato, ĉar mi tiel ofte venis ĉi tien.  
Krome mi donis ion al li.

S. Ĉu vi ĵus alvenis, aŭ jam antaŭ nelonge?

K. Antaŭ iom da tempo.

S. Do kial vi ne tuj vekis min, anstataŭ sidi flanke de mi silente?

K. Ne, je Zeŭso, Sokrato, tion mi ne volus fari. Se nur mi mem ne estus tiel sendorma kaj malgaja! Sed mi jam delonge miras pri vi, vidante ke dormas tiel dolĉe. Intence mi ne vekis vin, por ke vi estu laŭeble komforta. Jam antaŭe mi ofte pensis ke vi havas kontentan naturon dum via tuta vivo, sed pleje en la nuna malfeliĉo, ĉar vi portas ĝin tiel facile kaj trankvile.

S. Nu, Kritono, estus absurde se je mia aĝo mi ĉagreniĝus ĉar mi devas morti.

K. Tamen aliaj homoj samaĝaj kun vi, Sokrato, suferas similajn

- afliktojn, sed ilia aĝo ne malhelpas ke ili ĉagreniĝas pri sia sorto.
- S. Jes, vi pravas. Sed kial vi venis tiel frue?
- K. Ĉar, Sokrato, mi portas novaĵon malbonan. Ŝajne ne al vi, sed al mi kaj al ĉiuj viaj amikoj ĝi estas malbona kaj malgajiga, kaj, mi opinias, plej malgajiga al mi.
- S. Kiu estas la novaĵo? Ĉu alvenis la ŝipo el Delo, post kies alveno mi devos morti?
- K. Ĝi ankoraŭ ne alvenis, sed mi opinias ke ĝi venos hodiaŭ, laŭ kelkaj homoj kiuj venis el Sunion kaj forlasis ĝin tie. El iliaj raportoj evidentiĝas ke ĝi alvenos hodiaŭ, do morgaŭ. Sokrato, via vivo devos finiĝi.
- S. Nu, Kritono, bonŝancon al ĝi; tiel estu, se ĝi estas laŭ dia volo. Tamen, mi opinias ke ĝi ne alvenos hodiaŭ.
- K. Pro kio vi pensas tion?
- S. Mi rakontos. Mi ja devos morti la tagon post alveno de la ŝipo, ĉu ne?
- K. Jes, tion diras la aŭtoritatoj.
- S. Nu, mi opinias ke ĝi alvenos ne hodiaŭ sed morgaŭ. Tion mi konkludis el sonĝo kiu venis al mi antaŭ nelonge dum la pasinta nokto. Bone ke vi ne pli frue vekis min.
- K. Kion vi sonĝis?
- S. Mi sonĝis ke venis al mi virino bela, impona, en blanka vestaĵo, kiu vokis min kaj diris:
- “La trian tagon post nun atingos vi Ftion fekundan.”\*
- K. Jen stranga sonĝo, Sokrato.
- S. Ne, klara laŭ mi, Kritono.
- K. Tro klara, mi dirus. Sed, mia kara Sokrato, nun finfine aŭskultu min kaj savu vian vivon. Se vi mortos, tio estos por mi duobla malfeliĉo. Ne nur mi perdos tian amikon kian mi neniam trovos, sed krome multaj homoj, kiuj ne bone konas vin kaj min, opinios

\*) Citajo el Iliado de Homero, 9.363.

ke mi povis savi vian vivon per elspezo de mono, sed ne volis fari tion. Kaj ĉu oni povas havi pli malbonan reputacion ol esti homo kiu prefere havas monon ol amikon? Ĉar la plejmulto ne kredos ke ni klopodis forigi vin de ĉi tie, sed vi ne volis iri.

- S. Sed, kara Kritono, ĉu gravas al ni kion kredas la plejmulto? La plej saĝaj homoj, kies opinio estas pli konsiderinda, kredos ke la afero okazis kiel ĝi vere okazis.
- K. Tamen, ĉu vi ne vidas, Sokrato, ke oni nepre devas atenti la opinion de la plejmulto, ĉar ili povas, kiel montras nia nuna malfeliĉo, efiki ne nur etan, sed la plej grandan malbonon, se ili akceptas ies misreputacion.
- S. Ho, Kritono, se nur la plejmulto povus fari la plej grandan malbonon! Ĉar tiuokaze ili ankaŭ povus fari la plej grandan bonon, kaj tio estus dezirinda. Fakte ili povas fari nek unu nek la alian, ili ne povas fari iun saĝa aŭ malsaĝa, sed ili faras ĉion laŭŝance.
- K. Tio povas esti. Sed diru al mi, Sokrato, ĉu eble vi zorgas pri mi kaj viaj aliaj amikoj, kaj timas ke, se vi eskapos, la denunciatoj ĝenos nin dirante ke ni forŝtelis vin, kaj ni devige perdos nian tutan havaĵon aŭ almenaŭ grandan sumon, aŭ spertos ion eĉ pli malagrablan? Se vi timas tion, ne zorgu. Estas juste ke por savi vin ni akceptu tian riskon, aŭ eĉ pli grandan. Do lasu min persvadi vin kaj faru kion mi petas.
- S. Jes, Kritono, mi zorgas pri tio kaj pri multaj aliaj aferoj.
- K. Do, ne timu tion! Eĉ ne estas granda monsumo kiun oni postulas por savi vin kaj lasi vin eskapi. Pri la denunciatoj, ĉu vi ne vidas ke ili estas malaltprezaj kaj malgranda sumo sufiĉas por silentigi ilin? Kaj vi povas disponi pri mia mono; mi opinias ke ĝi sufiĉas, sed se vi zorgas pri mi kaj ne volonte uzas mian monon, ĉi tie estas eksterlandanoj kiuj volas pagi. Unu el ili, Simmias el Tebo, tiucele kunportis sufiĉan sumon, ankaŭ Kebes kaj multaj aliaj estas pretaj. Do ne zorgu pri tio kaj ne neglektu savi vian vivon. Kaj ne ĝenu vin tio, kion vi diris antaŭ la juĝistoj, ke vi ne sciis

kion fari pri vi mem se vi eskapus. Ĉar en multaj lokoj, kien ajn vi iros, oni bonvenigos vin. Se vi volas iri al Tesalio, mi havas amikojn tie kiuj alte estimos vin kaj protektos vin, tiel ke neniu en Tesalio nocos vin.

Krome, Sokrato, laŭ mi vi ne aga: juste se vi fordonos vin mem dum vi povas esti savita. Vi klopodas ke okazu al vi tio kion deziras viaj malamikoj, kaj kion alstrebas tiuj kiuj volas detrui vin. Krome vi perfidas laŭ mi viajn filojn; vi povas eduki kaj instrui ilin, sed vi foriros kaj forlasos ilin, kaj pro vi, ili devas akcepti iun ajn ŝancon, kaj verŝajne ili ricevos nur tian sorton kian orfoj ricevas en sia senpatra stato. Aŭ oni ne havu filojn, aŭ oni devas subteni, prizorgi kaj eduki ilin. Ŝajnas al mi ke vi elektis la plej facilan vojon, sed vi devus elekti kiel bona kaj kuraĝa homo; virto ja gravas al vi, kiel vi diris dum via tuta vivo. Do mi hontas pro vi, kaj ankaŭ pro mi kaj niaj amikoj. Mi timas ke oni pensos, ke tiu tuta afero rilate al vi okazis ĉar ni estis malkuraĝuloj: la fakto ke vi devis aperi antaŭ la juĝistoj, kio estis evitebla, kaj la tuta proceso, kaj nun finfine, kio ŝajnos tute mokinda, ke ni perdis nian ŝancon pro ia malnobleco aŭ malkuraĝo niaflanka, ĉar ni ne savis vin kaj vi ne savis vin mem, kvankam tio estus ebla kaj facila se ni nur iel taŭgus. Do konsideru, Sokrato, ĉu tio ne estas malbona kaj hontinda al vi kaj al ni. Do pripensu; fakte ne plu estas tempo pripensi, sed fini la pripensadon. Estas nur unu plano; ni devas agi la venontan nokton; se ni prokrastos, la ebleco estos for. Do, Sokrato, mi petas vin, lasu vin persvadi kaj ne rifuzu.

- S. Kara Kritono, via insisto estus laŭdinda, se ĝi montrus la ĝustan vojon; se ne, ju pli forta, des pli ĝena ĝi estas. Do ni devas demandi nin ĉu ni faru tion aŭ ne. Mi estas kaj ĉiam estis homo kiu ne sekvas miajn amikojn aŭ ion alian, sed nur la argumenton, kiu ŝajnas la plej bona. Kion mi diris pasinteco mi ne povas nun forĵeti pro mia nuna sorto; miaj argumentoj ŝajnas al mi la samaj

kiel antaŭe, kaj mi kiel antaŭe respektas kaj honoras ilin. Kaj se hodiaŭ ni ne trovos pli bonajn, estu certa ke mi ne cedos al vi, eĉ se la potenco de la plejmulto provos timigi nin, kiel oni timigas infanojn per teruraĵoj, per aferoj kiel karcerigo, mortigo aŭ konfisko. Do kiamaniere ni rigardu la aferon plej racie? Unue ni konsideru kion vi diras pri opinioj. Ni demandu nin: ĉu ni pravus kiam ni ĉiam antaŭe diris, ke oni devas atenti kelkajn opiniojn sed ne ĉiujn? Ĉu ni pravus ĝis mi estis mortkondamnita, kaj nun evidentiĝas ke ni parolis nur por argumenti kaj vere ĝi estis nur senseca ludo? Mi volas esplori, Kritono, kune kun vi, ĉu la argumento estas alia en la nunaj cirkonstancoj ol antaŭe, ĉu ni forlasu aŭ sekvu ĝin. Jen kion diris, laŭ mi, tiuj homoj kiuj havis ion saĝan por diri, ke la opinioj de kelkaj homoj devas esti alte estimataj, sed de aliaj ne. Je la dioj, Kritono, ĉu vi ne opinias ke tio estas prava? Vi ja, el homa vidpunkto, ne devas morti morgaŭ, do la nunaj cirkonstancoj devas ne erarigi vin. Do diru: ĉu vi ne opinias ke ni prave diris ke oni devas respekti ne ĉiujn homajn opiniojn, sed kelkajn kaj ne aliajn, kaj ne tiujn de ĉiuj homoj, sed tiujn de kelkaj sed ne de aliaj. Kion vi diras? Ĉu tio ne estas prava?

K. Jes, prava.

S. Do ni devas respekti la bonajn opiniojn sed ne la malbonajn?

K. Jes.

S. Kaj la bonaj opinioj estas tiuj de saĝaj homoj, la malbonaj tiuj de malsaĝuloj?

K. Sendube.

S. Do, kion ni diris pri tio? Se iu estas atleto kaj faras ekzercojn, ĉu li atentigas al ĉies laŭdo, mallaŭdo aŭ opinio, aŭ nur al tiuj de kuracisto aŭ trejnisto?

K. Tiuj de nur unu homo.

S. Do li devas timi la mallaŭdon kaj bonvenigi la laŭdon de nur unu, kaj ne de la plejmulto.

- K. Evidente.
- S. Kaj li devas agi, ekzerci, manĝi kaj trinki kiel direktas la unu homo kiu estas aŭtoritato kaj fakulo, prefere ol ĉiuj aliaj?
- K. Jes, vere.
- S. Bone. Sed se li malobeas tiun unu homon kaj malatentas liajn opiniojn kaj laŭdon, sed sekvas la dirojn de la multaj homoj kiuj ne havas fakan scion, ĉu tio ne malutilos al li?
- K. Sendube.
- S. Kaj kian malutilon? Kiel ĝi efikas, kaj kiun parton de la malobeanto ĝi trafas?
- K. Evidente lian korpon; tiun ĝi ja difektas.
- S. Prave. Do, Kritono, ankaŭ pri aliaj aferoj, kiujn ni ne ĉiujn bezonas listigi, pri aferoj de justo kaj maljusto, noblo kaj malnoblo, bono kaj malbono, kiujn ni nun pridiskutas, ĉu ni devas sekvi kaj timi la opinion de la plejmulto, aŭ de unu, se ekzistas unu kiu havas scion pri ili, kiun ni devas respekti kaj timi pli ol la aliajn? Kaj se ni ne sekvos lin, ni difektos kaj kripligos tion, kion plibonigos justeco kaj detruos maljusteco. Ĉu tio ne ekzistas?
- K. Laŭ mi jes, Sokrato.
- S. Do, se sekvante la opinion de la nesciantoj ni ruinigos tion, kion sano plibonigas kaj malsano kripligas, ĉu la vivo estas ŝatinda kiam tio estas ruinigita? Kaj tio estas la korpo, ĉu ne?
- K. Jes.
- S. Ĉu la vivo estas ŝatinda se la korpo estas mizera kaj kripligita?
- K. Certe ne.
- S. Tamen, ĉu la vivo estas ŝatinda kiam tio estas ruinigita kion maljusteco difektas kaj justeco plibonigas? Aŭ ni konsideru la korpon pli grava ol tiu parto de ni, kio ajn ĝi estas, kiu rilatas al justeco kaj maljusteco?
- K. Tute ne.
- S. Do, ĉu pli grava?

- K. Jes, multe pli.
- S. Do, kara amiko, ni devas tute ne atenti tion kion diras la plejmulto, sed kion diras tiu kiu havas scion pri justo kaj maljusto, nur li kaj la vero mem. Do en la komenco vi malpravis, kiam vi diris ke ni devas atenti la opinion de la plejmulto pri kio estas justa, nobla kaj bona, aŭ la mala. "Tamen," oni povus diri, "la plejmulto povas mortigi nin."
- K. Evidente; oni povus diri tion, Sokrato. Vi pravas.
- S. Kaj tamen, mia bona amiko, la argumentado kiun ni ĵus finis ŝajnas al mi la sama kiel antaŭe. Nun konsideru ĉu ni ankoraŭ akceptas, aŭ ne, ke plej gravas ne vivi, sed vivi bone.
- K. Jes, tion ni akceptas.
- S. Kaj vivo bone kaj vivi juste estas la sama; ĉu ni akceptas tion?
- K. Jes.
- S. Do, konsentinte pri tio, ni demandu nin ĉu estas juste aŭ maljuste ke mi provu eskapi el ĉi tie sen permeso de la Atenanoj. Se ĝi ŝajnas justa, ni faru ĝin, se ne, ne. Sed viaj argumentoj, Kritono, pri elspezo de mono, reputacio, edukado de miaj filoj, vere estas konsideroj de tiuj, kiuj facilanime mortigas homojn kaj, se ili povus, revivigus ilin sen iu penso, mi volas diri de la plejmulto. Sed ni, ĉar ni ne povas eskapi nian konkludon, devas pripensi nur kion ni ĵus diris: ĉu ni agas juste se ni donus monon kaj dankon al tiuj kiuj volas helpi nian eskapon, aŭ eskapante kaj planante eskapon ni vere agas maljuste. Kaj ŝajnas ke, se fari tion estus maljuste, ni devos ne konsideri ĉu ni mortos se ni restos ĉi tie trankvile, aŭ suferos ion ajn, sed nur ĉu ni agu maljuste.
- K. Laŭ mi vi noble parolis, Sokrato, sed kion do ni faru?
- S. Ni kune konsideru tion, kara amiko, kaj se vi povos kontraŭdiri ion kion mi diras, faru tion kaj mi cedos al vi, sed se ne, amiko, ĉesu ripeti la saman, ke mi devas foriri de ĉi tie sen la konsento de la Atenanoj, ĉar gravas al mi ke mi agu kun via konsento, kaj ne kontraŭ via volo. Rigardu la komencon de nia

argumento, ĉu ĝi kontentigas vin, kaj provu respondi al la demando laŭeble bone.

K. Mi provos.

S. Ĉu neniel ni agu maljuste kun intenco, aŭ en kelkaj aferoj ni agu maljuste, sed en aliaj ne? Ĉu ni ankoraŭ akceptu, kiel ni faris antaŭe, ke agi maljuste neniam estas bone kaj honorinde? Ĉu ĉiuj niaj antaŭaj konkludoj nun post kelkaj tagoj estu forjetindaj? Ĉu, Kritono, ni maljunuloj, dum ni serioze diskutis, neniam rimarkis ke ni agis nur kiel infanoj? Ĉu ne tio kion ni diris antaŭe ankoraŭ valoras, ĉu la plejmulto konsentas aŭ ne, ĉu niaj suferoj estos pli aŭ malpli premaj ol la nunoj? Ĉu ne agi maljuste ĉiamaniere estas malbone kaj hontinde al la aganto? Ĉu ni diru tion aŭ ne?

K. Jes, tion ni diru.

S. Do ni devas tute ne agi maljuste.

K. Certe ne.

S. Do ni eĉ ne pagu maljuston per maljusto, kiel opinias la plejmulto, ĉar ni tute ne agu maljuste.

K. Ŝajnas esti tiel.

S. Bone. Do, Kritono, ĉu ni faru malbonon aŭ ne?

K. Ne, Sokrato.

S. Nu, do, ĉu estas juste rekompenci malbonon per malbono, kiel diras la plejmulto?

K. Certe ne.

S. Ĉar fari malbonon al homoj estas la sama kiel agi maljuste, ĉu ne?

K. Jes, vere.

S. Do ni devas neniam rekompenci malbonon per malbono, aŭ fari malbonon al iu, kion ajn li faris al ni. Atentu, Kritono, ke konsentante pri tio vi ne akceptas ion, kio kontrastas al via vera opinio. Mi ja scias ke malmultaj kredas aŭ kredos tion. Tiuj kiuj kredas tion, kaj tiuj kiuj ne, ne havas komunan bazon kaj nepre devas malŝati unu la alian pro siaj kontraŭaj opinioj. Do bone pripensu, ĉu vi konsentas kaj havas la saman opinion kiel mi, kaj

ni komencu nian diskuton akceptante ke neniam ni devas agi maljuste, aŭ pagi maljustecon per maljusteco, aŭ kiam ni suferas malbonon rekompensi per malbono. Ĉu vi malkonsentas, kaj ne volas akcepti tiun elirpunkton? Mi ĉiam kredis kaj ankoraŭ kredas tion, sed se vi havas alian opinion, diru tion al mi. Se tamen vi konsentas, aŭdu tion, kio sekvas.

K. Mi konsentas kaj akceptas tion. Daŭrigu.

S. Do mi daŭrigas la argumenton, aŭ prefere mi demandas: Ĉu homo devas fari tion kion li konsentis fari, se ĝi estas justa, aŭ rajtas rompi la konsenton?

K. Li devas fari ĝin.

S. Do pripensu ĉu forirante de ĉi tie sen konsento de la ŝtato, ni ne malutilus al iuj homoj, kaj al tiuj al kiuj ni tute ne devus malutili. Ĉu ni tenu tion, kion laŭ nia konsento estas justa, aŭ ne?

K. Mi ne povas respondi al via demando, Sokrato, ĉar mi ne komprenas ĝin.

S. Nu, rigardu ĝin el tiu vidpunkto: Se, dum mi estus forkuronta (aŭ uzu alian vorton se vi volas) la Leĝoj kaj la Komunumo de la Urbo venus al mi kaj alparolus min tiel: "Diru nin, Sokrato, kion vi intencas fari? Ĉu vi per la ago, kiun vi planas, intencas detrui la leĝon kaj la tutan ŝtaton, se tio dependos de vi? Ĉu vi opinias ke la ŝtato povas ekzisti kaj ne esti faligata, se la juĝistaj decidoj ne valoras, sed povas esti senfortigataj kaj neniigataj fare de privataj civitanoj?" "Kion ni diru, Kritono, responde al tiuj kaj similaj demandoj? Oni povus citi multajn argumentojn, precipe se oni estas oratoro, por defendi la leĝon, ke juĝoj devas efikiĝi, kiun ni volas rompi. Eble ni respondos ke la ŝtato maljuste traktis nin kaj malbone juĝis nin. Ĉu ni diru tion, aŭ kion alian?"

K. Jes, je Zeŭso, Sokrato, tion ni diru.

S. Kion, se la Leĝoj respondus: "Sokrato, ĉu tiel estas la konsento

kiun vi faris kun ni, aŭ vi konsentis akcepti la juĝojn de la ŝtato?" Se tio surprizus nin, ili verŝajne daŭrigus: "Ne surpriziĝu pro niaj vortoj, Sokrato, sed respondu, ĉar vi havas la kutimon demandi kaj respondi al demandoj. Kiun mankon vi trovas en ni kaj en la ŝtato, pro kiu vi volas detrui nin? Unue, ĉu ne estas ni kiuj estigis vin? Ĉu ne pro ni via patro edziĝis kun via patrino kaj generis vin? Diru, kiujn vi malaprobas inter ni, eble la leĝojn pri edziĝo?" "Mi ne malaprobas ilin", ni dirus. "Aŭ eble la leĝojn pri infannutrado, aŭ pri la edukado kiun vi ricevis. Ĉu ne estas bonaj la leĝoj kiuj ordonis ke via patro prizorgu vian mensan kaj fizikan edukadon?" "Ili estas bonaj", mi respondus. "Nu, ĉu estigite, nutrite, edukite, vi povus diri, unue, ke vi ne estas nia ido kaj nia sklavo, kiel estis ankaŭ viaj prapatroj? Kaj se jes, ĉu vi opinias ke viaj rajtoj estas egalaj al niaj, tiel ke vi rajtas rekompence fari al ni ion ajn kion ni faras al vi? Ne ekzistis tiaj egalaj rajtoj inter vi kaj via patro, vi kaj via mastro, se vi havus iun. Se li suferigus lin, vi ne rajtus repagi lin, reinsulti se li insultus vin, aŭ refrapi se li frapus kaj tiel plu. Ĉu vi opinias ke vi rajtas fari tion kontraŭ via patrujo kaj la leĝoj, do se ni decidis detrui vin ĉar tio ŝajnas al ni justa, vi rajtas rekompence detrui la leĝojn kaj vian patrujon, kaj vi diras ke tiel vi agos juste, vi al kiu vere gravas justeco? Ĉu vi, kiu estas saĝa, ne komprenas ke pli ol via patrino kaj via patro kaj ĉiuj viaj prapatroj via patrujo estas honorinda kaj respektinda, kaj inda je alta estimo de dioj kaj ĉiuj raciaj homoj, ke vi ŝuldas al ĝi, kiam ĝi koleras, pli da respekto, obeemo kaj humileco ol al via patro, ke vi devas aŭ konvinki ĝin per persvado, aŭ fari kion ĝi ordonas. Se ĝi ordonas vin suferi, vi suferu trankvile, se ĝi vipigas aŭ enkarcerigas vin, aŭ sendas vin en batalon kie vi estos vundita aŭ mortigita, tio estas farenda kaj ĝi estas justa, ni devas ne rezigni aŭ forkuri aŭ forlasi nian postenon, ĉu en batalo, ĉu juĝejo aŭ ie ajn, sed fari kion ordonas la ŝtato, via patrujo, aŭ per persvado montri kio estas justa. Per-

forto estas malpermesata kontraŭ patro aŭ patrino, sed eĉ pli kontraŭ via patrujo". Kion ni respondu, Kritono? Ĉu la Leĝoj pravas aŭ ne?

K. Laŭ mi ili pravas.

S. Eble la Leĝoj dirus: "Pripensu, Sokrato, se ni pravas, vi nun planas trakti nin maljuste. Ni ja estigis vin, nutris kaj edukis vin, kaj donis al vi, kiel al ĉiuj civitanoj, vian parton de niaj bonaĵoj. Krome ni proklamis ke ĉiu Atenano, kiu atingis maturan aĝon kaj rigardis la regadon de la urbo kaj nin, la Leĝojn, se li ne ŝatas nin, rajtas kunporti la siaĵojn kaj iri kien li volas. Kaj neniuj el ni, la Leĝoj, malhelpas aŭ malpermesas ke iu el vi, kiu ne ŝatas nin kaj la ŝtaton, kunportu la siaĵojn kaj iru por vivi ĉu en iu el la kolonioj, ĉu en iu fremda loko. Sed iu, kiu vidinte kiamaniere ni regas kaj juĝas, restas ĉi tie, fakte kun ni interkonsentis fari tion kion'ni obeas, kaj ni diras ke malobeante nin li faras trioblan maljustecon: unue li malobeas tiujn kiuj estigis lin, due tiujn kiuj edukis lin, kaj trie, kvankam li konsentis obei nin, li nek obeas nin nek persvadas nin ke ni malpravas. Ni ja donis al li ŝancon fari tion, kaj ne krude postulis ke li obeu, sed li faris nek unu, nek la alian.

Do ni diras ke vi, Sokrato, tiel kulpas, se vi faros laŭ via intenco, vi ne malpli sed pli ol aliaj Atenanoj". Kaj se mi dirus "Kial?" eble ili riprookus, tute juste, ke mi pli klare ol la aliaj Atenanoj faris tiun interkonsenton. Ili dirus: "Sokrato, ni havas fortajn pruvojn ke ni kaj la urbo plaĉis al vi. Vi ne restus en ĝi pli konstante ol aliaj Atenanoj, se vi ne estus pli kontenta pri ĝi ol aliaj. Vi neniam foriris eĉ por vidi ludojn, krom unufoje la Istmiajn, aŭ por io alia, krom pro militservo, vi neniam faris vojaĝojn kiel faras aliaj homoj, aŭ deziris eltrovi ion pri aliaj urboj kaj aliaj leĝoj, sed vi estis kontenta pri ni kaj pri la urbo. Tiel tutkore vi preferis nin kaj konsentis esti regata de ni; krome la fakto ke vi generis idojn en ĝi pravas ke ĝi kontentigis vin. Antaŭ la tribunalo vi povus proponi ekzilon kiel punon, do tiel

vi estus farinta kun la konsento de la ŝtato kion vi nun intencas fari sen ĝia konsento. Tiam vi fanfarone diris ke ne estus aflikto se vi devus morti, ke vi preferus morton al ekzilo. Nun vi povas memori tiujn vortojn sen honto, kaj vi ne respektas nin, la Leĝojn, kaj volas detrui nin; vi agas kiel agus la plej malnobla sklavo, ĉar vi volas forkuri, malgraŭ la interkonsentoj kaj kontraktoj obei nin kiun vi faris kun ni. Respondu unue, ĉu ni pravis kiam ni diris ke vi konsentis, ne vorte sed fakte, obei nin, aŭ ne?" Kion ni respondus, Kritono? Ĉu ni povus fari ion krom konsenti?

K. Ni devas konsenti, Sokrato.

S. Ili daŭrigus: "Ĉu, do, vi ne rompas la interkonsenton kaj kontraktojn, kiujn vi faris kun ni ne rezulte de iu devigo aŭ trompo, aŭ decido post mallonga tempo, ĉar dum sepdek jaroj vi povus foriri se ni ne plaĉus al vi, kaj se vi konsiderus la kontrakton maljusta? Sed vi ne preferis Sparton aŭ Kreton, kvankam vi ĉiam diris ke ili havas bonajn leĝojn, nek iun alian el la grekaj aŭ fremdaj urboj. Vi forlasis nian urbon eĉ malpli ofte ol faras lamuloj, blinduloj kaj aliaj kripluloj. Tiom pli ol aliaj Atenanoj vi ŝatis la urbon kaj evidente ankaŭ nin, la Leĝojn, ĉar al kiu povus plaĉi urbo sen leĝoj? Ĉu nun vi volas rompi la interkonsenton? Ne, se vi obeos nin, Sokrato. Ne ridindigu vin forirante el la urbo!

Pripensu, kion bonan vi farus al vi kaj al viaj amikoj, se vi rompus ĝin kaj agus kontraŭleĝe? Viaj amikoj riskos esti ekzilitaj, kaj perdi siajn hejmojn en la urbo kaj siajn havaĵojn, tio estas preskaŭ certa. Kaj vi mem, se vi irus al iu el la proksimaj urboj, eble al Tebo aŭ Megaro, kiuj ambaŭ havas bonajn leĝojn, vi iros kiel malamiko de ilia leĝaro, Sokrato. Ĉiuj tieaj civitanoj, al kiuj la ŝtato gravas, rigardus vin kun suspekto, kiel detruanton de la leĝoj. Vi pravigus la opinion de la juĝistoj, kaj ili opinius sian juĝon justa. Ĉar kiu detruas la leĝojn sendube aperas kiel koruptanto de junaj kaj senspertaj homoj. Ĉu eble vi evitas bone regatajn

urbojn kaj bonkondutajn homojn? Ĉu tia vivo valorus la penon? Kaj se vi irus al ili kaj ne hontus konversacii — pri kio, Sokrato? Ĉu vi dirus, kiel antaŭe, ke virto kaj justeco estas plej valoraj al la homoj, kaj laŭleĝa konduto kaj leĝoj? Kaj ĉu vi ne opinias ke la konduto de Sokrato ŝajnus malaprobinda? Vi nepre opinias tion. Aŭ, supoze vi evitus tiujn lokojn, kaj irus al la amikoj de Kritono en Tesalio, ĉar tie regas granda malordo kaj manko de disciplino. Eble la homoj tie amuziĝus aŭskultante kiel ridinde vi forkuris el malliberejo surmetinte ledan mantelon aŭ similan kamuflaĵon, kian uzas forkurantoj, por ŝanĝi sian aspekton. Ĉu ne eble iu dirus ke maljunulo, kun mallonga tempo por vivi, tiel senhonte volis alkroĉi sin al la vivo, ke li rompis la plej gravajn leĝojn? Eble ne, se vi ne ofendus iun, sed se jes, Sokrato, vi devus aŭskulti multajn hontindaĵojn pri vi mem. Do vi vivos kiel flatanto kaj sklavo al ĉiuj homoj, kaj kiucele? Nur por ke oni regalu vin, kvazaŭ vi rifuĝis en Tesalion nur por manĝi. Kion pri viaj konversacioj pri justeco kaj aliaj virtoj? Eble vi volas vivi pro viaj filoj, por ke vi povu nutri kaj eduki ilin. Sed kiel? Ĉu vi kondukos ilin al Tesalio, nutros kaj edukos ilin tie, por ke ili estu fremduloj, kaj ili ankaŭ tiun benon ricevu de vi? Se ne, ĉu ili estus pli bone prizorgataj kaj edukataj en Ateno dum vi estus vivanta, se vi ne estus kun ili, ol dum vi estus mortinta? Sendube, viaj amikoj prizorgos ilin. Ĉu ili faros tion se vi irus al Tesalio, sed ne kiam vi iros al Hadeso? Se tiuj, kiuj nomas sin viaj amikoj, entute taŭgas, ili faros tion ĉiuokaze.

Do, Sokrato, obeu nin, kiuj prizorgis vin, kaj ne estimu viajn filojn aŭ la vivon aŭ ion ajn pli ol justecon, tiel ke kiam vi alvenos Hadeson, vi povos pledi per tiuj aferoj antaŭ la tieaj regantoj. Ĉar se vi faros laŭ via intenco, tio estos nek en ĉi tiu vivo, nek en la vivo postmorta pli bona, justa kaj pia por vi aŭ por viaj amikoj. Nun vi foriros de ĉi tie maljuste traktita, ne de ni sed de homoj, sed se vi forkuros, kaj senhonore rekompencas mal-

juston per maljusto kaj malbonon per malbono, rompinte la interkonsentojn kaj kontraktojn kun ni kaj farante malbonon al tiuj kiujn vi devus ne noci, al vi mem, viaj amikoj, via patrujo kaj ni, ni koleros kontraŭ vi dum ni vivos, kaj niaj fratoj, la leĝoj de Hadeso, ne afable akceptos vin sciante ke vi laŭ via povo provis detrui nin. Ne lasu Kritonon persvadi vin fari laŭ lia konsilo.”

Tiuj, kara amiko Kritono, estas la vortoj kiujn mi ŝajne aŭdas, same kiel la Koribantoj imagas aŭdi flutsonojn, kaj tiuj vortoj resonas en mi kaj malebligas al mi aŭdi ion alian. Do sciu ke vi parolos vane, se vi diros ion kontraŭan. Tamen, se vi opinias ke vi havas ion utilan por diri, diru.

K. Ne, Sokrato, mi havas nenion por diri.

S. Do, Kritono, tiel estu, kaj ni sekvu tiun vojon, ĉar ĝi estas la vojo laŭ kiu Dio kondukas nin.

## ENH AVO

|                               |    |
|-------------------------------|----|
| Antaŭparolo . . . . .         | 7  |
| Apologio de Sokrato . . . . . | 11 |
| Kritono . . . . .             | 37 |